

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №1



## Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №1 (315)

**La Ondo de Esperanto** aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redakcio:**

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

**Retpoŝta adreso:** laondodeesperanto@gmail.com

**Retejoj:** <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

**Abontarifo por 2023**

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

**Anonctarifo**

Plena paĝo: 50 eŭroj (2500 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1500 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (750 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (500 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2023, №1 (315).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 31 марта 2023 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Eventoj</b> .....	<b>5</b>
Partopreninto. JES 2022-2023: Kial elstare unika? .....	6
Lu Wunsch-Rolshofen. Novjarfesto kun 181 partoprenantoj el 14 landoj .....	8
Andreas Diemel. Luminesk': Renkonti la novan jaron .....	10
Vjaĉeslav Ivanov. La 8a Afrika Kongreso de Esperanto .....	11
Venontjare UEA unuafoje kongresos en Afriko .....	12
Alain Favre, Nicole Margot, Stefano Keller. Ĝenevo: Esperantistoj en sesio de la Homrajta Konsilio .....	13
Albert Stalin Tancinco Garrido. TEJO: Rezulto de la Administra Subvencio 2023 .....	14
Xie Ruifeng, Chen Ji. Ĉinio: Nova epoko, novaj taskoj kaj nova progreso .....	15
Liba Gabalda. MES 2023, ĉu la lasta? .....	18
Tuomo Grundström. EAF: Vintraj Tagoj kaj jarkunveno en Jyväskylä .....	20
David Ruíz Sánchez. La sukcesa RenKEJtigo en Katalunio .....	21
Mato Ŝpekuljak. Kurso de Esperanto en Societo Poligloto .....	22
Irina Gonĉarova. APERo-16: hejma etoso kaj politika neŭtraleco .....	23
Wolfram Rohloff. Bibliaj Tagoj en Treviro .....	24
Bharat Kumar Ghimire. Speciala Ekskurso en Nepalo. ....	26
Jorgos. La Korusa Semajno: La 30a finiĝis, ek al la 31a! .....	28
Ilona Koutny. Unujara instruista trejnado ĉe UAM .....	29
Halina Gorecka. Varsovio akceptos la Bibliotekon Hector Hodler .....	30
IKU en Torino – plej riĉa programo post 2015. ....	31
Aleksander Korĵenkov. UK-108: Ĉu baldaŭ 1000 aliĝintoj? .....	32
La 51a Internacia Infana-Adoleskanta Kongreseto .....	33
Peter Baláž. Centoj da poliglotoj kunvenos junie en Pollando .....	34
Fortalezo akceptos kvar samtempajn kongresojn .....	36
Jubilea, 100-a Germana Kongreso en Braunschweig .....	37
Katalin Kováts. Denove okazos retaj KER-ekzamenoj en junio .....	38
La 72a Kristana Kongreso: Dialogo inter religioj .....	38
La 96a Kongreso de SAT okazos ĉeeste en Greziljono .....	39
Irina Gonĉarova. Temploj kaj Urboj N°3. Tula. Temo: 1874 .....	39
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas .....	40
<b>Tribuno</b> .....	<b>41</b>
Paweł Fischer-Kotowski. Edmund Grimley Evans: Mi estas ĝenerale pesimisma pri ĉio, sed ne speciale pri Esperanto. Intervjuo kun Edmund Grimley Evans .....	42
Stanislav Belov. Viziti Marson sen kosma flugo .....	47
Aleksander Korĵenkov. Censo 2020: Esperanto en Ruslando malkreskas .....	49

Amri Wandel. Du precizigoj pri la scienca programo de la 107a UK .....	50
Bernhard Westerhoff. Bahaa Esperanto-Ligo 50-jara .....	51
Jaes Estrada. Bobelarto: Literaturamantoj maratonis en la reto .....	53
Subtenu Esperanton en la librofoiro en Rio-de-Janeiro .....	54
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago .....	55
<b>Arkivo .....</b>	<b>56</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2023 .....	57
<b>Kulturo .....</b>	<b>59</b>
Aleksander Korĵenkov. Andrejev, juĝenketisto, kolektanta informojn por akuza akto. .60	
Leonid Andrejev. La anĝelete. Silento. La abismo. El rakonto, kiu neniam estos finita (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova, Vladimir Vyĉegjanin) .....	61
Paulo Sérgio Viana. Fine de somero .....	97
Miguel Fernández. Nova ĝenro: Mikronovelo. ....	100
Alberto García-Teresa. El Gvidlibro pri Manglejo (Tradukis el la hispana Miguel Fernández) .....	102
Aleksander Korĵenkov. Ekzakte 100 libroj en 2022 .....	107
Aleksander Korĵenkov. <i>Orienta Almanako</i> : Nova senpaga bitlibro de <i>Sezonoj</i> .....	110
Wolfgang Kirschstein. En la mondo blovas nova vento .....	111
Kirilo Brosch. "Mesaĝon aŭdas mi, sed mankas al mi kredo" (Recenzo: Ryszard Rokicki. <i>Enkonduko en la morfologion de Esperanto</i> ) .....	116
Carlo Minnaja. Kulturo de popolo, popolo kun kulturo (Recenzo: <i>Esperanta Kulturo</i> )	120
Suso Moinhos. Necesaj studoj (Recenzo: Humphrey Tonkin. <i>Memoru ĉi praulojn</i> )...	124
Floréal Martorell. <i>Realeco</i> de Mikel Klav: La unua muzika albumo en 2023 .....	127
Floréal Martorell. <i>Tra la sonĝoj</i> : La unua bitalbumo de JêLe. ....	128
Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> pri kulturo .....	129
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2022, №45 .....	129
<i>Literatura Foiro</i> , 2023, №321 .....	130
La 3a Interkultura Novelo-Konkurso .....	132
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Nova senpaga libro de <i>Sezonoj</i> : <i>Dek du rakontoj</i> de Paulo Sérgio Viana. ....	133
<b>Mozaiko .....</b>	<b>134</b>
Stanislav Belov. Aĥ, tiuj virinoj... ..	135
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj .....	136
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	137

**Kovropaĝe:** La stranga pejzaĝo, malfermanta la martan *Ondon* tute estas nek ekstertera, nek fantazia. Ĝi prezentan argilminejon nomatan Urala Marso, kiu troviĝas je kvindeko da verstoj de la naskiĝurbo (Kamyŝlov) de la *Onda* redaktoro. (Foto: Vyacheslav Bukharov).



# *Eventoj*



La komencojn de la 2021a kaj 2022a jaroj la esperantistoj festis en etaj familiaj aŭ amikaj rondoj. Sed la 2023a jaro por kelkaj centoj da verdstelanoj komenciĝis en unu el la tradiciaj jarŝanĝaj renkontiĝoj JES, NR kaj Luminesk', reokazintaj en Germanio kun multaj festaj programeroj. Sur la supra foto Jonny M kanzonas en la Junulara Esperanto-Semajno apud Oranienburg. (Foto: Ivo Miesen)



LPG koncertas (Foto: Ivo Miesen)

## JES 2022-2023: Kial elstare unika?

La Junulara Esperanto-Semajno (JES) estas ĉiujara evento, kiu estas organizata de la Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj de la Pola Esperanto-Junularo (PEJ) dum la jarŝanĝa semajno.

La 13a JES okazis je la jarŝanĝo 2022-2023 apud Oranienburg en Germanujo, sub la respondeco de Christine Bizono. Unu el la plej unikaj aferoj de ĉi tiu JES estis ĝia organizado sub la respondeco de privatulo, ĉar GEJ kaj PEJ ĉi-jare decidis ne okazigi JES pro manko de homoj kaj forto. Tamen du personoj, Christine Bizono kaj Karlos, decidis preni la iniciaton kaj private organizi la eventon.

Tio ne signifas ke tiuj duope faris ĉion sole! Tuj ekestis internacia teamo de homoj el Danlando, Germanujo, Francio, kaj Hispanio. Ĉiu teamano prenis taskon kaj ene de tiu rajtis memstare decidi kaj agi. Pro tio la teamo bone kunlaboris kaj solvis ĉiajn eblajn malfacilaĵojn. Krome la Dana Esperanto-Junularo (DEJ) kaj la Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) helpis per pruntado de mono por antaŭpagi la domon. Poste GEJ aliĝis al la teamo por helpi kaj havi dum JES sian jarĉefkunsidon.

JES 2022-2023 okazis post la pandemia paŭzo, kaj estis ege helpa kaj unika afero, ke ni ekhavis privatulojn kiuj per donacoj helpis kaj iĝis patronoj de JES 2022-2023. Ni kore dankas al JC kaj Clemens el Germanujo! Tiu mono iris al nia JES fonduso por ebligi ĉeeston de ne tiom riĉaj personoj.

JES-13 havis multajn unikajn aferojn, elstara estis la barela saŭno. Ĝi ege utilis kaj post la novjara banado la saŭnado okazis eĉ kun koncerto ĉe la saŭno. Pinta estis la unua prezentado de Dreg-Reĝ-in-a aktorado. Dreg-reĝo (surbaze de pli konata Dreg-Reĝino) estas virino kiu portretas aŭ satirumas stereotipan masklan konduton en tipa maskla vestaĵo kaj aspekto ene de scenrolo. Ni havis ambaŭ Dreg-Reĝinojn kaj Dreg-Reĝojn. La publiko estis forte ravita.

Ni havis planitajn koncertojn de *La Perdita Generacio* (LPG), Jonny M, *Kajto* kun gvidado de balfolk-dancado dum Silvestro, kaj de Gijom. Krome estis spontanaj koncertoj de *La Kuracistoj*, ĴeLe, Melono kun amiko, Demlin sole kaj kun Devid, Gavan kun Lesley kaj kompreneble de la tuta JES-orkestreto.

La elstara internacia vespero estis granda programero de JES. La partoprenantoj povis sperti multajn diversajn kulturojn, kaj la prezentantoj estis talentaj kaj profesiaj. Unu el la unikaj aferoj de JES estis la improviza teatro kaj ties amuza prezento. Krome estis komuna muzikumado kaj prezento de eta orkestro sub la gvido de Gavan kune kun LPG kaj la plej longa labambado per vivanta muziko.

Pli ol cent personoj dum la Silvestra balo kune festis la komencon de la nova jaro. Unika estis ankaŭ la manĝebleco, ĉar ni ofertis nur veganan aŭ vegetaran manĝon. La rezulto de la mendoj estis, ke 30% elektis la veganan kaj 70% la vegetaran manĝon. Por homoj, kiuj ege bezonis viandon, estis eta kuirejo por memzorgi.

Entute aliĝis 127 personoj el 26 landoj: Germanujo, Francujo, Italujo, Belgujo, Nederlando, Britujo, Pollando, Slovakujo, Usono, Barato, Kostariko, Danlando, Svedujo, Bulgarujo, Ĉeĥujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Kubo, Litovio, Mordoro, Norvegujo, Portugalujo, Ruslando, Svislando, Turkujo.

## Partopreninto



Foto: Ivo Miesen



## Novjarfesto kun 181 partoprenantoj el 14 landoj

Feliĉe, finfine okazis la 19a Novjara Renkontiĝo, de la 27a de decembro 2022 ĝis la 3a de januaro 2023, tiom dezirata de multaj post du provoj malsukcesaj pro la kronvira pandemio. Venis entute 181 homoj, inter kiuj 39 infanoj kaj junuloj, el 14 landoj; plejparte el Eŭropo, sed ankaŭ el Israelo kaj Urugvajo. La renkontiĝo okazis en Wiesbaden, iomete okcidente de Frankfurto-ĉe-Majno, Germanio.

La etoso estis denove tre bela kaj vigla, al kio kontribuis la multfaceta programo, kiun plejparte kreis partoprenantoj; kiel kutime proksimume triono ofertis iun eron. Estis prelegoj, diskutoj kaj ekzemple gimnastiko, baletto, ĉigongo, manlaboro, kreado per argilo kaj bananoj kun ĉokolado por la pli junaj entuziasmoj. Kelkaj diskutoj kaj unu prelego estis aranĝitaj virtuale per Zoom. Okazis krome pluraj promenoj tra la urbo kaj kelkaj ekskursoj, interalie, al la bahaa templo en Hofheim.

En la vespera programo elstaris la koncerto de jOmO, kiu brile sukcesis varmigi la etoson kaj danciĝi certe trionon de la ĉeestantoj; li evidente estis tre amata de multaj junuloj, kiuj levis antaŭe preparitajn ŝildojn: “jOmO, ni amas vin”, “Jes, jOmO, mi volas DANCI kun vi”, “JOMO, friponu por ni” aŭ “JOMO por ĉiam”.



JoMo en Wiesbaden (Foto: Carolin Weemeyer)



Same sukcesa estis la bela pupteatra prezentado de Christoph Frank (la Mirakla scenejo, Zauberbühne). Ĉi-foje temis pri *Cirko, eta mond'*, kie prezentiĝis la plej eta cirko de la mondo kun elefantpiramido, grimpanta leono k. a.

En la unua vespero okazis la jam tradicia interŝanĝo de bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kunportitaj de la partoprenantoj. Estis ankaŭ pluraj koncertoj, interalie, de Ludger Schmeink (Infanoj kaj ilia mondo en la muziko).

Certe okazis Silvestra festo kun bongusta bufedo kaj poste du dancejoj por junuloj kaj plenkreskuloj. La internacia vespero havis dudekon da prezentadoj plej diversspecaj. En la lasta vespero estis ekrane prezentita la nova muzikalo *June kaj kune*, kies kreiĝon organizis TEJO.

Dume ĉiutage raportis Laura Brazzabeni per intervjuoj kaj filmetoj. Tiujn filmetojn, fotojn kaj la registraĵojn de kelkaj vesperoj eblas rigardi ĉe [http://esperanto.land/noro19\\_fotoj\\_filmoj](http://esperanto.land/noro19_fotoj_filmoj).

## Lu Wunsch-Rolshoven

NR-19. Por kvardeko da junaj partoprenantoj en Wiesbaden estis tradicie preparita speciala programo (Foto: Michaela Espi)



## Luminesk': Renkonti la novan jaron

Luminesk' estas internacia Silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio kaj daŭrigo de la antaŭe private organizita "Internacia Festivalo". Ĝi okazis la sepan fojon je la jarŝanĝo 2022/23 kaj enhavis varian kaj altkvalitan programon: lingvo-kurso, prelegoj kaj diskutrodoj, ekskursoj kaj kultura vespera programo. La 50 partoprenantoj venis el 10 landoj.

La renkontiĝo okazis en la sese plej granda urbo en Baden-Württemberg, Heilbronn, kun 126 mil enloĝantoj en la nordo de la lando, apud la rivero Neckar, 50 km for de Stuttgart. En Heilbronn kunligiĝas grandurba etoso kun ŝvaba gemuteco. La vinurbo apud la rivero Neckar montras tradicion kaj modernan urboevoludadon. Luminesk' restadis en la junulargastejo de Heilbronn kun siaj ruĝaj brikoj rigardindaĵo proksime de la ĉefa stacidomo kaj de la scienca ekspozicio "esperimenta".

Kiel plurfoje en la pasinteco, ankaŭ ĉi-jare okazis kadre de Luminesk' la Internacia Vintra Universitato (IVU), jam la 14a sesio. IVU estas iniciato de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), simila al la Internacia Kongresa Universitato dum la UK, kiu okazas en la jarŝanĝaj kunvenoj en Germanio ekde 2007, komence dum la Internacia Festivalo kaj sekve dum la NoRo kaj Luminesk. La IVU-prelegoj povas trakti plej diversajn temojn kaj estas popularnivelaĵ. La konstanta rektoro de IVU estas prof. Amri Wandel, prezidanto de AIS.

La tuttaga ekskurso dum la Luminesk' en Heilbronn kondukis al Neckarsulm matene. En la urbo, kie kunfluas Neckar kaj Sulm, ni vizitis la muzeon pri duradoj. Gvidita vizito donis sciojn pri la sekretoj de la durada veturilo en la pasintaj jardekoj. La posttagmezo kondukis nin al Bad Wimpfen. La historia malnova urbo kun siaj duonlignaj konstruaĵoj invitas nin al gvida vizito.

**Andreas Diemel**



## La 8a Afrika Kongreso de Esperanto

En la senegala urbo Tieso la 26-30an de decembro 2022 okazis la pinta evento de afrika Esperanto-movado – la 8a Afrika Kongreso. Ĝi estis longe atendata kongreso, ĉar pro la pandemio la kongreso ne povis okazi en 2020 kaj 2021. Aliĝis al la kongreso 107 personoj, sed ne ĉiuj sukcesis veni. La partoprenantoj venis el 14 landoj, kio igas la eventon la plej internacia en la serio. Inter la partoprenantoj estis 21 novaj movadanoj de la Senegala Esperanto-Asocio, kiuj sukcese trapasis ekzamenon pri la lingvoposedo dum la kongreso.

La 8a Afrika Kongreso estis multilate unika: ĝi estis ĝis nun la sola, en kiu povis plene kaj ĉeeste kunveni la tuta Afrika Komisiono de UEA; ĝi estis ankaŭ la unua, antaŭ kiu oni sukcesis, danke al internaciaj klopodoj de multaj individuoj kaj organizoj, fari pli ol dumonatan kurson de Esperanto en du lokaj urboj: Dakaro kaj Rufisko. La lecionojn gvidis Vjaĉeslav Ivanov (de oktobro, en ambaŭ urboj) kaj Espoir Kasati (en decembro, ĉefe en Rufisko), fine de la kurso la lecionoj estis ĉiutagaj en du grupoj. Pri la organizo kaj pri la uzo de la loke plej uzata *volofa* lingvo multe helpis la senegalaj aktivuloj Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta.

Okazis prelegoj pri la esperantista movado ĝenerale kaj specife en Germanio (Andreas Emmerich), Madagaskaro (Ranja Zafinifotsy) kaj Senegaloo (Assane Faye). Vjaĉeslav Ivanov prelegis pri lingva diverseco kaj lingva politiko en diversaj landoj, François Lo Jacomo rakontis pri la agado de Unesko kaj pri esperantistoj en tiu organizo.





Ne mankis futbala matĉo de esperantistoj kontraŭ loka kvartala klubo – la verdaj kontraŭ la bluaj – la lokanoj gajnis 4:0, sed esperantistoj “videbligis Esperanton” per siaj belaj T-ĉemizoj kaj kuraĝo. Estis organizita vespero de tradiciaj dancoj kun invititaj muzikistoj kaj dancistoj, kiuj plenumis dancigan muzikon kaj instruis ĝuste utiligi ĝin dancante.

Bedaŭrinde la ĉefa motoro malantaŭ la evento – honora membro de ILEI Mireille Grosjean el Svislando – ne povis veni pro neatenditaj problemoj. Tamen ŝi multe helpis antaŭ la kongreso distance kaj eĉ prelegis helpe de Zoom pri historio de Afriko kaj pri bezono de bonaj rilatoj en esperantistaj organizoj.

Inter la plej diskutataj temoj de la kongreso estis akcepto de la Universala Kongreso en Tanzanio aŭ eventuale en alia lando de Afriko. Afrikanoj senpacience atendas realiĝon de ĉi tiu revo.

**Vjaĉeslav Ivanov**

## **Venontjare UEA unuafoje kongresos en Afriko**

Por la 109a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de UEA unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo Aruŝo (Arusha) estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol du milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la nacia parko Serengeti, la konservada areo Ngorongoro, la nacia parko Lago Manyara, la gorĝo Olduvai, la nacia parko Tarangire, la monto Kilimanĝaro kaj la monto Meru en la nacia parko Aruŝo mem.

La Esperanto-Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Aruŝo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multhoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# Tribuno



La Esperantisto de la Jaro 2022 Edmund Grimley Evans havas elstaran rolon en la lastatempa revigliĝo de la libroeldonado de EAB – kiel tradukanto, redaktoro aŭ provleganto. Legu en la sekvaj paĝoj intervjuon kun li, aranĝitan de Paweł Fischer-Kotowski. (La foto kun la libro *La domo ĉe Pu-Angulo* de Milne, kiun li tradukis, estas prenita el la retejo de EAB).

# *Mi estas ĝenerale pesimisma pri ĉio, sed ne speciale pri Esperanto*



## **Intervjuo kun Edmund Grimley Evans, la Esperantisto de la Jaro 2022**

**Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?**

La informo surprizis min, kompreneble, ĉar mi ne estas tiel eminenta kiel multaj antaŭaj laŭreatoj.

**La konkurso “Esperantisto de la Jaro” daŭras jam kvaronjarcenton. Unuafoje, en 1998, tiun titolon ricevis via samlandano William Auld, kun kiu vi iniciatis bibliografiadon de beletraj tradukoj el la angla. Ĉu tiu laboro progresis?**

Nu, iusence samlandano, sed iusence ne, ĉar Auld estis skoto, kaj mi nur anglo! Tiu *Bibliografio de tradukoj el la angla lingvo* aperis en 1996. Ĝi ĉefe konsistas el datumoj, kiujn Auld kolektis dum jaroj kaj tajpis sur slipoj. Mi ĉion enkomputiligis kaj trakontrolis (laŭ mia scio, Auld mem neniam uzis komputilon), kaj mi ankaŭ aldonis kelkajn aferojn, kiujn mi diversmaniere trovis.

Ĝis 1998 mi iom korektis la dosierojn kaj aldonis aferojn, sed ĝuste en tiu tempo aperis io, kio igas tian paperan bibliografion malpli bezonata: AltaVista, la plej sukcesa retserĉilo de sia epoko, aperis en decembro 1995. Poste, ĉirkaŭ 2000, ĝin preterpasis Guglo, kompreneble.

Hodiaŭ, se oni volas ekscii, ĉu verkoj de iu aŭtoro estas esperantigitaj, oni povas turni sin al retserĉilo kaj al Vikipedio. Se oni ekscias pri traduko, pri kiu oni ankoraŭ ne povas facile trovi mencion en la reto, aŭ se oni mem tradukas ion, oni povas aldoni ĝin al la vikipedia paĝo pri la aŭtoro: kaj mi petas, ke oni nepre faru tion, por diskonigi la informon.

Interretaj informoj estas evidente iom ĥaosaj kaj malpli fidindaj ol zorge farita bibliografio, sed ili estas pli aktualaj kaj senpagaj por la leganto. Do mi supozas, ke ne plu tre indus okupiĝi pri nova eldono de tiu *Bibliografio*.

Mi enkomputiligis la dosierojn, per kiuj mi kreis la *Bibliografion*, kaj la ŝanĝojn faritajn ĝis 1998, ĉe <https://github.com/egrimgley/anglabib/>.

**Unu el la motivoj por elekti vin estas la grava rolo, kiun vi plenumis ĉirkaŭ la lastatempa eldona agado de Esperanto-Asocio de Britio. Temas precipe pri infanlibroj, kiuj diversaspekte elstaras laŭ la kvalito (du el ili, en 2020 kaj 2022, ricevis la premion Infanlibro de la Jaro). Kial vi decidis okupiĝi ĝuste pri infanlibroj?**

Konscia decido ne vere okazis. Mi supozas, ke la unua grava infanlibro de EAB, pri kiu mi okupiĝis, estis la dua eldono de *Mil unuaj vortoj en Esperanto*, kiu aperis en 2004. Samjare naskiĝis mia unua filino, kiu tre ŝatis la libron, do jen unu klarigo por mia intereso pri infanlibroj.

Tamen, la dua eldono de *Mil unuaj vortoj* ne aperis pro mi. Mi supozas, ke la unua eldono elĉerpiĝis, kaj intertempe aperis novaj bildoj: ĉar la libro estis produktita per “kunpresado”: grava nacilingva eldonejo presas la samajn kolorajn bildojn por ĉiuj eldonoj kaj poste aldonas la tekston per nigra inko por ĉiu lingvo aparte. Tiel eblas fari mirinde belan libron mirinde malmultekoste eĉ por lingvoj, kiuj ne bezonas tre multajn ekzemplerojn.



Multaj el la belaj infanlibroj eldonitaj de EAB ekde *La Krubalo* en 2019 estis produktitaj per kunpresado, simile kiel *Mil unuaj vortoj*, sed kunlabore kun alia grava nacilingva eldonejo. Ne mi prizorgas la rilatojn kun tiu eldonejo, kaj ne mi faras la enpaĝigon, kiu ofte estas komplika, ĉar vortoj aperas en la bildoj, kaj kelkfoje oni devas adapti tiparon, aldonante supersignojn. Tion prizorgas Tim Owen. Sen li la lastatempa eldonagado de EAB ne povus okazi.

Ne ĉiuj infanlibroj de EAB estas produktitaj per kunpresado: *La domo ĉe Pu-Angulo* estis presita de EAB mem en tradicia maniero. Ĝi aspektas tre simile kiel anglalingva eldono, ĉar ni aĉetis rajton uzi la samajn bildojn, sed ni (fakte Tim Owen denove) devis aranĝi la presadon. La origino de tiu libro estas traduko, kiun mi faris speciale por mia

filino Isabel: ŝi tre ŝatis la unuan libron pri Winnie-la-Pu.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# Viziti Marson sen kosma flugo



Argilminejo vidata de supre (Vyacheslav Bukharov)

**Ĉu vi vizitis Marson? Mi jam faris tion kaj sugestas al vi sekvi mian ekzemplon jam ĉi-somere. Kiel? Tre simple – aĉetu bileton al Jekaterinburgo kaj poste veturu per aŭto ne pli ol du horojn. Vi revenos kun unika sperto kaj fotoj kiuj konfirmos vian vojaĝon al la ruĝa planedo. Ek!**

Kompreneble ne temas pri kosma flugo, planata de diversaj kosmoagentejoj por 2045-2050. Sed vi povas trovi pejzaĝojn similajn al tiu en Marso jam nun, relative simple kaj malmultekoste. Jen sugestoj surbaze de mia vojaĝo kun la familio kaj geamikoj somere de 2022.

Temas pri malnova minejo de fajrorezista argilo, kiu troviĝas en Bogdanoviĉa distrikto de Sverdlovskaja provinco, meze de Ruslando. Ĝi estas ekspluatata jam pli ol cent jarojn kaj dum tiu periodo estiĝis grandegaj fosaĵoj, sur kies muroj kaj fundo videblas sedimentaĵoj de la karbonia epoko. Plejparte tio estas kaolinito kaj glimo, sed renkonteblas ankaŭ kvarco, klorito, pirito, rutilo kaj aliaj mineraloj. La argilo de tri tipoj etendiĝas forme de krestoj ĝis 1,5 km longaj kaj ĝis 30 metrojn larĝaj.

La longdaŭra fosado kreis mirindan reliefon kaj la miksaĵo de la mineraloj dispen-tris ĝin per plej buntaj koloroj, draste kontrastaj sur la fono de la modesta naturo de Uralo. Imagu – la ruĝa, flava kaj blua tero etendiĝas je pluraj kilometroj, rustaj krestoj kaj montetoj serpentas ĝis horizonto, oranĝaj laĝetoj sen iuj ajn vivosignoj spegulas la sunradiojn senmove. Kaj vi staras meze de tio ĉi kvazaŭ astronauto.



La minejo plu estas ekspluatata – oni povas renkonti kelkloke grandajn fosmaŝinojn kaj barilojn, kiuj malebligas vizitadon de kelkaj areoj. Sed plejparto de la teritorio estas ne uzata por la minado, nek iel ajn prizorgata. Tion profitas turistoj, kiuj venas amase. La minejo ne deziras respondeci pri la eksteruloj kaj eventualaj riskoj, do ĝi ne kreas infrastrukturon por la vizitantoj, kio tamen ne haltigas la kuraĝulojn. Oni povas veni kadre de organizita ekskurso en buso aŭ veturi memstare per aŭto – ĉiuj navigiloj konas la lokon kaj gvidas al ĝi.

Sed mi sugestas al vi unue veni al la apuda vilaĝo Poldnevoj, aĉeti manĝaĵojn kaj aliajn bezonaĵojn, kaj direktiĝi suden. Forlasinte la vilaĝon, vi veturos ne pli ol kvin minutojn kaj vidos maldekstre la minejon. Lasu la aŭton kaj marŝu ducent metrojn tra la kampo. Estu atenta, prenu la plej fortikajn ŝuojn kaj estu preta grimpi, salti kaj ekvilibri sur la perfidema argila grundo – promenado laŭ Marso ne estas facila afero.

Ni pasigis tie du horojn, faris belajn fotojn, akiris unikajn impresojn kaj bone amuziĝis. Poste ni veturis al la orienta flanko de la minejo, kie sur bordo de artefarita lago ni aranĝis ĝuindan piknikon, uzante alportitan rostilon kaj aŭskultante gajan muzikon.

La vojo de Tjumeno estas pli longa (240 km), sed same bona. Se vi veturos ĉi-somere, verŝajne vi spertos certajn malkomfortaĵojn, ĉar la ŝoseo inter la du urboj estas rekonstruata kaj transformata je kvarstria rapida vojo laŭ kiu oni povos sekure kaj komforte veni de Moskvo tra Kazano kaj Jekaterinburgo al Tjumeno. Sed sperta vojaĝanto ne timas tiaĵojn, ĉu ne? Do preparu vian valizon kaj ek – al la ruĝa planedo meze de Ruslando!

**Stanislav Belov**



Foto de Stanislav Belov

## Censo 2020: Esperanto en Ruslando malkreskas

Antaŭ 11 jaroj en *La Ondo* aperis resuma artikolo pri la Ruslanda censo en 2010, kaj, danke al la multaj referencoj, nun ĝi okupas la unuan lokon laŭ la nombro de la “legoj” en nia novaĵretejo. Intertempe en Ruslando okazis plia censo, planita por oktobro 2020, sed pro la koronavirusa pandemio prokrastita je unu jaro. Reale ĝi okazis ekde la 15a de oktobro ĝis la 14a de novembro 2021, sed la jaro 2020 en la titolo ne ŝanĝiĝis (same kiel “Olimpikoj-2020” okazis en 2021 k. s.).

Laŭ la rezulto de la censo la nombro de la konstanta loĝantaro en Ruslando je la 1a de oktobro 2021 estis 147,2 milionoj da homoj: je ĉ. du milionoj pli multe ol en 2010 – 145,1 mln (tiam nur 142,9 sen la loĝantoj de Krimeo kaj Sebastopolo nombritaj en 2014). En Ruslando nun loĝas 68,4 milionoj da viroj kaj 78,8 milionoj da virinoj. Dum la 11-jara intertempo, la nombro de la urboj kun pli ol unu miliono da loĝantoj kreskis de 12 ĝis 16.

La esperantistojn nature interesas la nacia kaj lingva rezultoj de la censo. Sed la statistiko pri tiuj estas proksimuma, ĉar sian nacian apartenon ne indikis 16,6 milionoj da homoj, kaj indikis ĝin 130,6 milionoj. En 2010 sian naciecon ne indikis 5,6 mln da homoj, kaj en 2002 nur 1,5 mln da homoj (1%) ne indikis ĝin.

Inter la indikintoj, la ses plej grandaj naciaj grupoj (kun pli ol unu miliono da indikintoj) en Ruslando estas rusoj 105,57 (80,85%), tataroj 4,71 (3,61%), ĉeĉenoj 1,67 (1,28%), baŝkiroj 1,57 (1,20%), ĉuvaŝoj 1,06 (0,82%), avaroj 1,01 (0,78%).

Ankaŭ pri la lingvoj ne eblas doni precizan statistikon, ĉar ĉ. 12 milionoj da respondintoj ne indikis siajn posedatajn lingvojn. Preskaŭ ĉiuj ruslandanoj (pli ol 99%) konas la rusan lingvon, kaj en la dua loko, same kiel en 2020, estas la angla. Jen la unua lingvodeko: rusa 134,32 mln.; angla 5,06; tataro 3,26; ĉeĉena 1,49; baŝkira 1,08; germana 1,06; ĉuvaŝa 0,70; avara 0,65; ukraina 0,62; armena 0,50.

Esperanton indikis **nur 753 personoj**. Laŭ la antaŭa censo en 2010 en Ruslando estis 992 esperantoparolantoj (1012 inkluzive de 20 krimeanoj, enketitaj en 2014). Esperanto estas en la 124a loko. Ido preskaŭ malaperis, ĝin menciis nur unu persono, sed estis naŭ idoparolantoj en 2010; krome estis menciitaj Interlingvao (3 personoj) kaj Slovio (1). Kvar personoj indikis la lingvon Edo, sed ne estas klare, ĉu temas pri la planlingvo de Anton Antonov, aŭ pri la samtitola Niĝeria lingvo.

Laŭregione, plej multaj el la 753 Ruslandaj esperantoparolantoj loĝas en Moskvo 88, Sankt-Peterburgo 68, Moskva regiono 57, Ĉuvaŝio 37, Sverdlovskia regiono 31, Novosibirskia regiono 30.

Kvankam ne ĉiuj konantoj de Esperanto estis censitaj, kaj inter la sciantoj ne ĉiuj indikis Esperanton, la nombro 753 ŝajnas sufiĉe realisma. Do, almenaŭ unu ruslandano inter ĉ. 195 mil scias Esperanton, aŭ en Ruslando estas kvin esperantistoj por unu miliono da loĝantoj.

Ĉu kvin esperantistoj por unu miliono da loĝantoj estas multe, kompare kun aliaj landoj? Ni vidu kelkajn alilandajn censojn:

En 2011 la censo en Estonio evidentigis 209 esperantoparolantojn, t. e. ĉ. 160 por miliono da loĝantoj; do en Estonio oni povas renkonti esperantiston 32-oble pli ofte ol en Ruslando.

La censo en Litovio (2011) konstatis 604 personojn, kiuj scias Esperanton, do averaĝe 198 esperantoparolantoj por unu miliono da litovianoj, proporcie 40-oble pli ol en Ruslando.

En Hungario en 2011 entute 8 mil 397 personoj el ĉ. 10 milionoj da loĝantoj informis pri sia scio de Esperanto, do 850 esperantoparolantoj por unu miliono da loĝantoj; aŭ proporcie 170-oble pli ofte ol en Ruslando.

En 2013 la Novzelanda censo nombris 108 esperantoparolantojn, aŭ ĉ. 21 esperantoparolantoj por unu miliono da novzelandanoj.

La nombroj estas prenitaj el Vikipedio <https://mallonge.net/y5>.

Estas evidente, ke la esperantistoj en Ruslando estas malmultaj, kaj ili plu mal-multiĝas (probable, ankaŭ maljuniĝas). Bedaŭrinde, nur en malmultaj landoj oni enketas pri la lingvoscioj, sed estas klare, ke en Ruslando, en kiu Esperanto aperis, estas proporcie pluroble malpli multaj esperantosciantoj ol en landoj (orient)eŭropaj.

Fine: se la mondo lingvokone estus kiel Ruslando, Esperanton sciis 40 mil teranoj; sed se la mondo estus kiel Hungario, Esperanton sciis 6 milionoj 800 mil teranoj.

**Aleksander Korĵenkov**

## **Du precizigoj pri la scienca programo de la 107a UK**

Dankon al Jukka Pietiläinen pro la interesa artikolo (LOdE, 2022, №3). Tamen necesas precizigo pri la scienca programo. Li skribis: “Pro la manko de komunikado eventuale okazis tio, ke la kongresa libro reklamis la IKU-librojn je la prezo 15 eŭroj, sed la kongresa libroservo vendis ĝin tute laŭ kutimo de kongresaj libroservoj jam delonge, per 21 kanadaj dolaroj (proksimume 16 eŭroj)”. La eta diferenco inter la eŭra kaj dolara prezoj de la IKU-libro okazis ne pro manko de komunikado, sed pro la bezono de la Libroservo havi prezojn kiuj dividiĝas je 3, por ebligi trionan aŭ sesonan rabaton por aĉetantoj de tri ekzempleroj aŭ al revendistoj.

Dankon pro la konstato, ke la “IKU-programo estis tute kutima, eventuale eĉ pli ampleksa ol en kutimaj UKoj”. La IKU-programo ne nur estis pli ampleksa ol kutime, sed unuafoje en la historio de UK tute hibrida: eblis ĝin aŭskulti per Zoom kaj kelkaj prelegoj okazis per Zoom. Tio ne estas evidenta, ĉar la LKK kaj la Kongresa Fako ne prepariĝis por hibrida

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



Nia datrevena rubriko memorigas, ke antaŭ 106 jaroj, la 14an de aprilo 1917 ĉesis bati la koro de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof, iniciatoro de Esperanto kaj de homaranismo. Legu la artikolon pri la lastaj vivojaroj de Zamenhof en nia novaĵretejo <http://sezonoj.ru/2021/04/zamenhof-26>. La supran foton ni ricevis de Wu Guojiang, kiu kunordigas la projekton pri portretigo de 20 elstaraj esperantistoj.



# Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2023

1. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Pál Lengyel** (pron.: léndel, 1868-1898-1932), hungara presisto kaj esperantisto, teknika redaktoro de Presa Esperantista Societo en Parizo (1905-14), eldonanto de *Lingvo Internacia* (1899-1904), redaktoro de *Juna Esperantisto* (1909-14), redakciano de *Literatura Mondo* (1922-26), membro de la Lingva Komitato ekde ties fondo (LK, 1905) ĝis sia morto (1932), membro de la Akademio de Esperanto (AdE, 1910-28), honora prezidanto (1924-32) de Hungarlanda Esperanto-Societo, aŭtoro de *Libro de l' humoraĵo* (1899, bitlibro 2002) k. a.

• Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 174-175).

1. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Tyburcjusz Tyblewski** (1933-1951-1998), pola montara savisto, pedagogo, instruisto, psikologo kaj esperantisto; senatano de AIS kaj dekano de ties morfoscienca sekcio, redaktoro de *Pola Esperantisto* meze de la 1980aj jaroj, aŭtoro de *El la valo* (1981), *Fihonestulo* (1983), *Skizo pri personeco de esperantisto* (1985), *Psikosocia problemaro de internacia turismo* (1988) k. a., tradukinto de verkoj de Tadeusz Różewicz, Sławomir Mrożek, Czesław Miłosz k. a.

2. Antaŭ 100 jaroj (1923) en Venecio komenciĝis **Internacia Konferenco por Komerca Helplingvo** kun partopreno de delegitoj de 209 establoj (8 ministerioj, 87 komercaj ĉambroj, 21 foiroj k. a.) el 27 landoj; la konferenco, kies laborlingvo estis Esperanto, akceptis kelkajn rezoluciojn pri uzado de Esperanto en komerco, foiroj, radio, telegrafo kaj turismo.

7. Antaŭ 30 jaroj mortis **August Weide** (1904-1993), germana esperantisto, Cseh-metoda instruisto en pluraj landoj, aŭtoro de la ampleksa lernolibro *Esperanto laŭ la patrina metodo* (1979), kuntradukinto de la grava seksologia libro *ABZ de amo* (1972) de Inge kaj Sten Hegeler.

14. Antaŭ 106 jaroj mortis **Lazarj Markoviĉ "Ludoviko" Zamenhof** (Лазарь Маркович Заменгоф, 1859-1887-1917), ruslanda juda okulkuracisto, iniciatoro de Esperanto (1887) kaj de homaranismo (1906).

• Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 304-306). Pri la lastaj jaroj kaj pri la forpaso de Zamenhof legu la artikolon *Ho, mia kor', ne batu maltrankvile...* de Aleksander Korĵenkov <http://sezonoj.ru/2021/04/zamenhof-26>.

16. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Kenelm Ralph Creusé Sturmer** (1903-1922-1960), konata kiel Kenelm Robinson, brita dentoteknikisto kaj esperantisto, recenzanto kaj beletristo; aŭtoro de *Por recenzo!* (1930), *Se Grenereto...* (1930), *Apud stacidomo Victoria* (1930), *El la notlibro de praktika esperantisto* (1934) k. a., tradukinto de *Princino de Marso* (1938) de Edgar Rice Burroughs k. a.

27. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Arnošt (Ernesto) Váňa** (1908-1918-1998), slova forstisto, vegetarano kaj esperantisto, fondinto de *Slovaka Esperantisto* (1946) kaj de Esperanto-kooperativo (1947, konfiskita de la ŝtato), longtempa prezidanto de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio kaj redaktoro de *Esperantista Vegetarano*, aŭtoro de lernolibro de Esperanto por slovakoj (1946).

29. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Milan Zvara** (1933-1949-2002), kemiisto, naturprotektanto, vojaĝanto, mikologo, organizanto de turismo, fotisto kaj la plej konata esperantisto en Slovakio; Esperanto-instruisto, disvastiganto de Esperanto, prezidanto (1977-83, 1987-90) kaj vicprezidanto (1983-87) de Slovacia Esperanto-Asocio, prezidanto de Slovacia Esperanta Federacio (2001-02), komitatano de UEA (1982-95), estrarano (1975-84, 1987-90) kaj ĝenerala sekretario (1990-2002) de Monda Turismo, organizanto de multaj Esperanto-vojaĝoj, ekskursoj, renkontiĝoj kaj kongresoj, direktoro de la Esperanto-Centro en Poprad, kunaŭtoro de koresponda kurso de Esperanto por slovakoj (kun E. Tvarožek, 1990), tradukinto de *La scivolema elefantido* de Rudyard Kipling (kun N. Cassian kaj L. Dvorský, 1970).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 308-310).

30. Antaŭ 40 jaroj (1983) en Sverdlovsko (nun Jekaterinburgo, Ruslando) okazis la unua **Urala konferenco pri planlingvoj** kiel sekcio "Interlingvistiko/esperantologio" kadre de la Scienca studenta konferenco en la Sverdlovskia ŝtata pedagogia instituto; en la konferenco estis prezentitaj dek raportoj, plejparte esperantologiaj.

Aleksander Korĵenkov



## Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

# *Kulturo*



Post la verkoj de Ivan Bunin (marto 2022), Aleksandr Kuprin (junio), Maksim Gorjkij (septembro) kaj Fjodor Sologub (decembro) en nia literatura projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaĵoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento, aperas kvar verkoj de Leonid Andrejev.

# Andrejev, juĝenketisto, kolektanta informojn por akuza akto

Leoníd Nikolájevič Andréjev (Леонид Николаевич Андреев, 1871-1919) naskiĝis la 9an (Gregorie: la 21an) de aŭgusto 1871 en la gubernia ĉefurbo Orjol en la familio de geometro, poste bankoficisto Nikolaj Andrejev kaj Anastasija Andrejeva, fraŭline Packovskaja, filino de neriĉa pola bienulo.

Lia vivo pasis kutime ĝis 1889, kiam la patro mortis, la familio malriĉiĝis, la adorata junulino malakceptis lian amon. La desperinta gimnaziano decidis testi sian sorton: li kuŝiĝis inter la reloj antaŭ kureganta trajno kaj restis viva post ĝia trapaso. Do li fidis sian sorton, finstudis en la gimnazio kaj en 1891 aliĝis al la jura fakultato de la Peterburga universitato, sed en 1893 li estis eksigita pro nepagado de la studkotizo kaj post unujara paŭzo daŭrigis studi la juron en la Moskva universitato, vivtenante sin, la patrinon kaj la gefratojn per privataj lecionoj, portretado kaj hazardaj laboroj. Plia amfiasko en 1894 kondukis lin al nova sortoprovo: li pafis sin, kaj restis viva, sed lia sano estis damaĝita.

Post la diplomiĝo (1897) Andrejev eklaboris kiel asistanto de advokato en Moskvo, kaj samtempe kiel felietonisto kaj juĝraportisto en la tagĵurnaloj *Russkoje slovo* (La Rusa Vorto), *Moskovskij vestnik* (La Moskva Heroldo) kaj *Kurjer* (La Kuriero). Ĝuste en *La Kuriero* je Pasko 1898 aperis lia rakonto *Garasjka kaj Bargamot*, kiun Gorĵkij tre alte taksis kaj invitis la aŭtoron al kunlaboro en la Peterburga *Ĵurnal dlja vseĥ* (La Gazeto por Ĉiuj).

En 1900 Andrejev forlasis la juron kaj dediĉis sin al literaturo. Sekvajare ĉe la Gorkija eldonejo *Znanije* (Scio) aperis lia unua libro – novelaro, kies kvar reeldonoj dum unu jaro faris lin finance sufiĉe sendependa por vivi kaj verki, ne pensante pri pano ĉiutaga. En 1902 lia *La abismo* skuis la rusan legantaron kaj kaŭzis vastan socian polemikon.

Andrejev subtenis la unuan Ruslandan revolucion (1905-07); li estis arestita, kaŭĉie liberigita danke al Savva Morozov, kaj fine de 1905 li fuĝis eksterlanden. Lia revolucia entuziasmo velkis, kaj li devis forlasi la eldonprojektojn de Gorĵkij. Reveninte al Ruslando post tri jaroj, li okupiĝis ĉefe pri dramaturgio, nur de tempo al tempo verkante novelojn.

Same kiel Sologub, Andrejev fervore salutis la Grandan Militon, kiu, laŭ li, devis detrui la du germanlingvajn monarĥiojn, sed la dummilita bolŝevista ŝtatrenverso konsternis lin. Andrejev forlasis Peterburgon kaj restis en sia vilao en Vammelsuu (nun Serovo), kie la 26an de novembro 1917 li skribis: «Strange! Neĝo kaj frostoj, la luno lumas transfenestre, kaj estas nerompebla silento; kaj malfacilas imagi, ke apudas Peterburgo kaj la rabistoj. Sed mi vivas singarde, ĉar ĉio iĝis ebla. Ĉio! Ĵus mi ordigis la ĵurnalojn, mi volas konservi ilin sub la titolo “Malhonoraj tagoj de Ruslando”. Mi sentis, kvazaŭ mi estas ne ĵurnalisto kaj eĉ ne ruso, sed iu juĝenketisto, kolektanta informojn por akuza akto». Leonid Andrejev mortis la 12an de septembro 1919 pro korparalizo. Li estis nur 48-jara. Liaj libroj ĝis la mezo de la 1950aj jaroj (preskaŭ) ne aperis en la lando de l' venkinta proletaro, kaj poste estis eldonataj nur malmultaj verkoj, zorge kribritaj de la oficiala literatura estraro.

Multaj liaj prozaĵoj estas plurdekaĝaj romanetoj tro longaj por nia serio, sed mi esperas, ke la kvar rakontoj, tradukitaj de nia jam kvarkapa teamo, trovos vian ŝaton.

**Aleksander Korĵenkov**



# Leonid Andrejev

## LA ANĜELETO

### I

De tempo al tempo Saŝka[1] sentis deziron ĉesi fari tion, kion oni nomas vivo: ne lavi sin ĉiumatene per malvarma akvo, en kiu naĝas maldikaj glaciaj splitoj, ne viziti la gimnazion, ne aŭskulti tie kiel ĉiuj riproĉas lin, ne senti doloron en la lumbo kaj en la tuta korpo, kiam la patrino devigas lin stari surgenuje por la tuta vespero. Sed ĉar lia aĝo estis dek tri jaroj kaj li ne sciis ĉiujn metodojn, per kiuj homoj ĉesas vivi, kiam ili deziras tion, li daŭre vizitis la gimnazion kaj staris surgenuje, kaj al li ŝajnis, ke la vivo neniam finiĝos. Jaro trapasos, poste ankoraŭ unu jaro, kaj ankoraŭ unu, sed li vizitos la gimnazion kaj hejme staros surgenuje. Sed ĉar Saŝka havis neobe-eman kaj aŭdacan animon, li ne povis trankvile trakti la malicon kaj venĝis al la vivo. Por tiu celo li batis siajn kamaradojn, bruskis al la ĉefaro, ŝiris siajn lernolibrojn kaj dum la tuta tago mensogis jen al la instruistoj, jen al la patrino, nur al la patro li ne mensogis. Kiam dum pugnado iu batis lian nazon ĝis sango, li intence skrapis la vundon kaj kriegis senlarne, sed tiom laŭte, ke ĉiuj sentis sin malagrabla, sulkis siajn vizaĝojn kaj ŝtopis siajn orelojn. Kriinte dum la tempo, bezonata al li, li tuj ek-silentis, montris sian langon kaj desegnis en sia laborkajero karikaturojn pri si mem krianta, pri la vicklasestro[2] ŝtopinta siajn orelojn, kaj pri la venkinto tremanta pro timo. La kajero estis plena de tiaj karikaturoj, kaj plej ofte inter ili aperis jena: dika kaj malalta virino batis knabon, magran kiel alumeto, per ligna porpasta rulpremilo. Sub ĝi estis jena subskribo per grandaj kurbaj literoj: “Petu pardonon, hundido”, kaj la respondo: “Mi ne petos, eĉ se mi krevos”. Antaŭ la Kristnaska festo Saŝka estis forpelita el la gimnazio, kaj kiam la patrino komencis lin bati, li mordis ŝian fingron. Tio donis al li liberon, kaj li ĉesis matene lavi sin, dum la tuta tago vagadis kun aliaj knaboj kaj batis ilin, kaj timis nur malsaton, ĉar la patrino tute ĉesis nutri lin, kaj nur la patro kaŝis por li panon kaj terpomojn. En tiuj cirkonstancoj Saŝka trovis sian ekzistadon akceptebla.

Vendrede, antaŭ la Kristnasko, Saŝka ludis kun knaboj, ĝis tiuj disiris al siaj hejmoj kaj la barila pordeto knaris per rusta frosta knarado post la lasta el ili. Jam mal-lumiĝis, kaj de la kampo, apud kiu finiĝis la strateto, proksimiĝis griza neĝa nebulo; en malalta nigra konstruaĵo, staranta kontraŭ la strato, ĉe la elveturejo, eklumis ruĝa senflagra fajreto. La frosto iĝis pli forta, kaj, dum Saŝka iris en la hela rondo, kiu aperis ĉirkaŭ lumanta lanterno, li vidis etajn sekajn neĝerojn, kiuj nerapide ŝvebis en aero. Li devis iri hejmen.

– Kie vi vagaĉas ĝis la nokto, hundido?– La patrino kriis al li, levis sian pugnon, sed ne batis. Ŝiaj manikoj estis kuspitaj, vidigante ŝiajn blankajn, dikajn brakojn, kaj sur ŝia senbrova plata vizaĝo vidiĝis ŝvitaj bidoj. Dum Saŝka iris preter ŝi, li eksentis la kutiman odoron de vodko. La patrino gratis sian kapon per la dika montrofringro kun kurta malpura ungo kaj, ĉar ŝi jam ne havis tempon por insultoj, nur kraĉis kaj kriis:

– Statistikistoj, unuvorte!

Saŝka malestime snufis kaj iris trans la septon, kie aŭdiĝis la peza spirado de la patro, Ivano Savviĉ. Li ĉiam suferis pro malvarmo kaj penis varmiĝi, sidante sur la varmega kuŝejo[3] kaj metinte sub sin ambaŭ manojn per la manplatoj malsupren.

– Saŝka! Sveĉnikovoj invitis vin al la Kristnaska infana balo. Ilia servistino vizitis nin, – li flustris.

– Ĉu vi mensogas? – Saŝka demandis nekredeme.

– Je Dio. Nia megero al vi nenion diras, sed ŝi jam preparis vian jakon.

– Ĉu vi mensogas? – Saŝka ĉiam pli multe miris.

La riĉuloj Sveĉnikovoj, kiuj aranĝis lian lernadon en la gimnazio, post lia forpelo ordonis, ke li ne venu al ili. La patro denove ĵuris kaj Saŝka enpenisiĝis.

– Flankiĝu, ne sidu tiom larĝe! – li diris al la patro, saltante sur la kurtan kuŝejon, kaj aldonis: – Mi ne venos al tiuj diabloj. Ili fariĝos tro feliĉaj, se ankaŭ mi ilin vizitos. “Difektita knabo”, – Saŝka tiris la vortojn en la nazo. – Mem ili estas tro bonaj ja, demonoj dikmuzelaj.

– Aĥ, Saŝka, Saŝka!– la patro kuntiriĝis pro malvarmiĝo. – Ne daŭre vi portos vian kapon.

– Ĉu vi portas la vian?– Saŝka bruske objetis. – Prefere silentu, se vi timas vian propran edzinon. Ho, vi, fatraso!

La patro sidis silente kaj kuntiriĝante. Nehela lumo penetris tra vasta fendo desupre, kie la septo je kvarona arŝino ne atingis la plafonon, kaj kiel hela makulo falis sur lian altan frunton, sub kiu nigriĝis profundaj okulkavoj. Iam Ivano Savviĉ trinkegis vodkon, tiam la edzino timis kaj malamegis lin. Sed kiam li komencis sputi sangon kaj ne plu povis drinki, ŝi komencis drinki, iom post iom kutimiĝante al vodko. Kaj tiam ŝi venĝis ĉion, kion ŝi devis suferi de tiu alta, mallarĝbrusta viro, kiu diris nekomprenablajn vortojn, kelkfoje estis forpelita de la servo pro siaj neobeemo kaj drinkado, kaj kiu venigis al la hejmo gaste samajn longharajn aĉulojn kaj fierulojn, kia estis li mem. Kontraste al la edzo, ŝi fariĝis ĉiam pli sana dum ŝi drinkadis, kaj ŝiaj pugnoj iĝis pli kaj pli pezaj. Nun jam ŝi diris, kion ŝi volis, nun ŝi venigis al si virojn kaj virinojn, kiujn ŝi deziris, kaj kun ili laŭte kantis gajajn kantojn. Kaj li kuŝis post la septo, silentema, kuntiriĝis pro febrotremo kaj cerburnis pri la maljusteco kaj hororo de la homa vivo. Kaj al ĉiuj, kun kiuj devis interparoli la edzino de Ivano Savviĉ, ŝi plendis, ke mankas al ŝi en la mondo pli aĉaj malamikoj, ol ŝiaj edzo kaj filo: ambaŭ orgojluloj kaj statistikistoj.

Post unu horo la patrino diris al Saŝka:

– Sed mi al vi diras, ke vi venos al ili! – Ĉe ĉiu vorto Feoktista Petrovna pugnigis la tablon, sur kiu lavitaj glasoj saltis kaj tintigis unu la aliajn.

– Sed mi al vi diras, ke mi ne venos, – Saŝka senpasie respondis, kaj la anguloj de liaj lipoj tremetis pro la deziro montri la dentojn. Pro ĉi tiu kutimo en la gimnazio oni nomis lin lupido.

– Nu, mi vin draŝos, forte draŝos!– kriis la patrino.

– Nu, do draŝu!

Feoktista Petrovna sciis, ke bati la filon, kiu komencis mordi, ŝi ne plu povas, kaj se ŝi forpelos lin el la hejmo, li iros por vagaĉi kaj preferos frostiĝi ol veni al Sveĉnikovoj; do ŝi ekuzis la aŭtoritaton de la edzo.

– Vi ja nomiĝas patro, sed ne povas la patrino gardi kontraŭ insultoj.

– Kaj vere, Saŝka, iru al ili, kial vi pozaĉas?– tiu resonis de la kuŝejo. – Ili, eble, denove vin aligos al la gimnazio. Ili estas bonkoraj homoj.

Saŝka malestime kaj moke ridetis. La patro antaŭ longa tempo, antaŭ la naskiĝo de Saŝka, laboris kiel instruisto ĉe Sveĉnikovoj kaj de tiu tempo li opiniis, ke ili estas la plej bonaj homoj. Tiam li ankoraŭ servis en la zemstva statistika oficejo kaj tute ne drinkadis. Li foriris de ili post la edziĝo kun la filino de la luigantino, gravediĝinta de li, kaj li komencis drinkadi kaj falis ĝis tia grado, ke li, ebria, estis levata sur strato kaj kondukata al la policejo. Tamen Sveĉnikovoj plu helpis al li per mono, kaj Feoktista Petrovna, kvankam ŝi malamegis ilin, same kiel librojn kaj ĉion ligitan kun la pasinteco de sia edzo, alte taksis ĉi tiun konatecon kaj fanfaronis pri ĝi.

– Eble, ankaŭ al mi vi alportos ion de la balo, – daŭrigis la patro.

Li ruzis. Saŝka komprenis tion kaj malestimis la patron pro ties febleco kaj mensogo, sed li vere ekvolis alporti ion al la malsana kaj kompatinda homo, kiu jam longe restas sen bona tabako.

– Nu, jes! – li grumblis. – Donu do la jakon. Ĉu vi alkudris la butonojn? Ja mi konas viajn morojn!

## II

Infanoj ankoraŭ ne estis lasitaj en la salonon kun la Kristnaska abio, kaj ili sidis en la infana ĉambro kaj babilis. Saŝka kun malrespekta aroganteco iom aŭskultis ilian naivan paroladon kaj palpis en sia pantalona poŝo jam dispeciĝintajn cigaredojn, kiujn li sukcesis ŝteli en la kabineto de la mastro de la domo. Jen al li venis la plej juna Sveĉnikov, Kolja[4], kaj haltis senmove kaj montrante miregon kaj kuniginte siajn piedpintojn interne kaj metinte la fingron al angulo de siaj pufaj lipoj.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Fine de somero*

**de Paulo Sérgio Viana**



Li vekigis kiam la unua taglumo envenis tra lia dormoĉambra fenestro. Lia tuta korpo estis ankoraŭ mola kaj senforta, sed lia menso jam klare mesaĝis: “Hodiaŭ estas la lasta somera tago.” Efektive, morgaŭ, en la tuta suda hemisfero, komenciĝos unu plia aŭtuno. Estis eksterordinare, ĉar en ĉiuj pasintaj jaroj li neniam atentis pri tia transiro, kiu okazadas de kiam la Tero ekzistas. Hodiaŭ ĝi tamen ŝajnas al li mirinda kalendarajo. Li estis modesta gimnaziano, kiam antaŭ sesdek jaroj li lernis la klarigon pri la ŝanĝo de sezonoj laŭ la rondirado de la Tero ĉirkaŭ la Suno. Hodiaŭ, precipe en ĉi tiu mola vekiga momento, li trovas tre malfacile ripeti tian klarigon al iu ajn infano, kaj eĉ al si mem. Prefere stariĝi, viziti la tualetejon kaj trinki kafon.

Hodiaŭ matene li devos partopreni kunvenon de la amikoj de la kvartalo. Hmmm, iom teda kunsido, kiam gemaljunuloj renkontas unu la aliajn, babilas, interŝanĝas siajn novaĵojn (kiuj fakte ne ĉiam estis vere novaj), ripetas diraĵojn, trinkas kafon kaj fruktosukon. Foje unu el ili legas poemon, alia kantas kanzonon akompane de sia iom ruĝa gitaro, tria rakontas anekdoton, kaj fine ĉiuj revenas hejmen kontentaj, ke la vivo daŭras, same kiel dum la lastaj jardekoj. Ĉi-foje oni informos, ke forpasis la simpatia kaj de ĉiuj estimata S-ino A., post longa surlita malsano, kaj ĉiuj staros dum unu silenta minuto omaĝe al ŝi. Poste oni informos pri la naskiĝo de unu plia nepo de Ges-roj B., la sesa infano en ses jaroj — la familio B. estas fekunda, Dio benu.

Li surmetis sian flavan ĉemizon kaj decidis piediri ĝis la kvartala malnova salono. Ĉiujare li surportis novan ĉemizon por tiu tradicia evento. Tio estis kaprico de Liza. Ŝi ĉiujare, fine de la somero, aĉetis por li novan, koloran ĉemizon. Ŝi diradis, ke nova, laŭmoda vesto junigas la homon. Ankaŭ al si ŝi provizis novan ĉarman bluzon. Tiel la paro elegante envenis la kunvenejon, kaj ĉiam elvokis ekkriojn de admiro kaj envio. Hodiaŭ ne. Hodiaŭ li alvenos en sia flava, pasintjara ĉemizo, kaj la najbaroj diskrete, sindetene salutos lin.

Ĉiun paŝon li faris kiel rememoron.

Li preterpasis ĝardeneton de S-ino C., kie li ĉiujare ŝtelis tra la barilo floreton el arbusto por transdoni al Liza. Ĉi-foje ŝi ne admonis lin ĉarme, ke ne decas elpluki



floron el aliula ĝardeno. (Sed ŝi ĉiam fiere portis la floreton en la mano ĝis la kunvenejo, kaj ĉiuj najbaroj povis rimarki, ke ankaŭ ĉi-jare ŝi gajnis floron.)

Ĉe la sekva stratangulo loĝis la maljuna S-ro instruisto Ĉ., kiu pasigadis la matenojn rigardante ĉe la fenestro. Liza ĉiam haltis ĉi tie por kelkaj minutoj da babilo. Ŝi demandis lin pri lia sano, poste pri la bonfarto de lia familio, poste ili parolis pri la vetero, kaj tio sufiĉis. La edzo mem ne trovis ion interesan en la figuro de la malnova instruisto, sed Liza amegis lin. Li iom ĵaluzis.

Li plu antaŭeniris, ĝis la panvendejo. Jes, survoje estis panvendejo, kaj Liza postulis halton por spirado kaj por gluto de freŝa minerala akvo. Foje ŝi manĝis ankaŭ dolĉaĵeton, sed nepre necesaj estis la halto, la saluto al la vendejestro kaj la malvarmeta akvo. Ĉiam egale, dum multaj jaroj. Hodiaŭ li ne devis eniri la panvendejon. Li ne soifis.

Sur la trotuaro, ĉe la enirejo de la kvartala salono, kie okazos la tradicia “Ne nur najbaroj, sed amikoj”, kutime sidis ĉifona, maljuna, malgrasa, almozetanta virino. Tio ĉiam kaŭzis al li malkomforton. Al li ne plaĉis doni almozojn. Li sentis ian honton, kvazaŭ la humiligo turniĝus al li, anstataŭ al la almozetanto; li do kutime preterpasis, ŝajnigante, ke li ne vidis la petanton. Sed kiam Liza ĉeestis, li nepre devis halti, serĉi monerojn en la poŝo kaj ilin meti sur la malpuran manon de la maljunulino. Kaj nepre aŭdi la mallaŭtan riproĉeton de la edzino, ke li devus doni iom pli da mono... Ĉi-foje li haltis, elprenis pli valoran monbileton kaj ĝin enmanigis, plena de honto. Kaj li rapide eniris la salonon.

La ejo estis ankoraŭ preskaŭ senhoma. Liza ofte moketis lin, ke li emas alveni tro frue, kaj al tio li ĉiam respondis, ke ŝi emas alveni, kiam la salono estas plena de homoj, por ke ĉiuj admiru kaj laŭdu ŝian novan bluzon. Kaj ambaŭ ĝue ridis pro la tradicia, multjara interŝerco. Li sidiĝis sur flanka seĝo kaj pacience atendis.

Je la preciza horo komenciĝis la sesio. Unu kantis, alia deklamis, urbkonsilanto paroladetis pri siaj meritoj en la progreso de la kvartalo. Oni informis pri nova restoracio en la kvartalo. Oni informis ankaŭ pri ĵusaj naskiĝoj, omaĝis ĵusajn forpasintojn. Li ĉion aŭdis iom streĉita, iom maltrankvila, sed neniu menciis la nomon de Liza. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi lasis skriban peton al la organizantoj de “Ne nur najbaroj, sed amikoj”, ke kiam ŝi mortos oni ne anoncu ĉi tiun faktan en la jara kunveno.

Kiam la kunvenestro pretis fermi la kunsidon, tiam el malantaŭa seĝovico starigis junulo, kiu laŭte petis permeson deklami poemeton omaĝe al sia amatino. La junulino sidanta apud li ruĝiĝis kaj honte ridetis. Oni permesis al la romantika junulo la petolaĵon. Li iris antaŭ la publikon kaj laŭte, vikle kaj firme deklamis:

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



Alberto García-Teresa (Foto: Jimena Cuerva)

# El Gvidlibro pri Manglejo

## Mikronoveloj de Alberto García-Teresa

### **Strato Krutaĵo, n-ro 2**

La domo ludas ŝanĝi la seruron de sia pordo. Ĉi tiun ĉiumatene ĝi modifas kaj interŝanĝas kontraŭ la seruro de alia loĝejo en la vilaĝo. Tiel, ĉiutage, iu el la najbaroj devas veni al strato Krutaĵo, n-ro 2, kaj tie pasigi la nokton ĝenata de pruntita lito, pruntita piĵamo kaj, kiu scias?, eble ankaŭ pruntitaj sonĝoj.

### **Strato Poleno, n-ro 7**

La izoleco suferata de la loĝantoj en strato Poleno, n-ro 7, ne estas monaĥa opcio. La familio en ĝi loĝas en enfermiteco generacion post generacio. Oni ne scias de kiam. Iel aŭ alie, laŭlonge de la historio, neniu, ĉu interna aŭ ekstera, kapablis malfermi la pordon, rompi la fenestrovitrojn aŭ, eĉ se nur, faligi la murojn de la loĝejo.

Tie, aŭtarkie kaj rezignacie, la domanoj vivas marĝenan ekzistadon. Kutime, ili komuniĝis kun la vilaĝanaro parolante tra la stratpordego, sed raŭkiĝo kaj pigriĝo fine igis la solecon grundi. Malgraŭe, oni akurate restarigas la kontakton por flustri kondolencojn al la familio, ĉiufoje, kiam densa fumo eliĝas tra la kamentubo.

### **Strato Rojo, n-ro 1**

Ene de la domo n-ro 1 de la strato Rojo, oni mutiĝas. La tie loĝanta familio, babilema kiam ĝi troviĝas en la vilaĝo, mutiĝas tamen ene de sia hejmo. Ankaŭ vizitantoj ne povas elparoli vortojn sub ĝia tegmento.

La domo eĉ turniĝis en spacon de retiriĝo, de meditado kaj de intelekta kreo. Ne malofte, oni tie renkontiĝas kun filozofino aŭ kun poeto, kiuj luis ĉambron por certa tempo. Malfacilas nur diveni, en kiu lingvo ili parolas.

### **Strato Filiko, n-ro 6**

La spacaj koordinatoj estas subjektivaĵo en la domo n-ro 6 de la strato Filiko. Se iu metis ordon en la liniojn, kiuj ŝnuras nian pozicion al la mondo, aŭ klasis la leĝojn, kiuj regas la movon, tiu ne devus eniri ĉi-domen por ne frenezigi de stuporo. En tiu loĝejo, aleatore, sen laŭi ajnan ŝablonon, sen preni en konsideron la angulon de la sunfloroj, la melodion de la merloj aŭ la amasiĝon de la formikoj ĉirkaŭ la spikoj, la ĉambroj dancas. Sed temas ne pri simpla danco inter pozicioj, sed pri tio, ke komplete renversiĝas ebenaĵoj kaj gravito. Tiel la ĉambroj rekonsideras kaj vertikalecon kaj horizontalecon laŭvole. Eĉ, ene de difinita ĉambro, la aksoj mislokiĝas kadre de freneza simfonio, kie, bonŝance, ĉiuj aferoj interakordas plue, precize kiel printempo.

### **Strato Migdalarbo, n-ro 7**

La loĝantoj en la vilaĝo lasis disponebla la domon n-ro 7 en la strato Migdalarbo por loĝigi siajn fantomojn. Tie rezidas la lokaj fantomoj. Laŭvice la komunumanoj alternigas la laborojn de bontenado kaj purigo de la domego. Kiam ili realigas tiujn taskojn, kelkaj sentas neantaŭvideblajn karesojn, subitajn vangoruĝojn, sentas, ke iliaj ungoj kreskas, kaj eĉ korŝiran ĝojon, kiu forvapiĝas tiel subite kiel ĝi alvenas. Sed ili ankaŭ aranĝas la litojn, batas la tapiŝojn, purigas la vitrojn kaj fermas la pordon zorge por eviti ĝenon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Ekzakte 100 libroj en 2022

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo de Esperanto* ĉiujare publikigas statistikon de la libro-produktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en *Hungara Vivo*. Por tiuj malmultaj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” (LA) en la revuo *Esperanto*, en kiu estas registrataj ĉiuj paperaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro. Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en LA estas registrataj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵojn kaj fidele vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn librojn, kaj en LA kutime mankas lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste Aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado tra libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj kaj eldonejoj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj.

Sed mankas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”. Vidu la rezulton.

<b>Jaro</b>	<b>Libroj Paĝoj</b>		<b>Jaro</b>	<b>Libroj Paĝoj</b>	
1991	222	26.091	2007	184	31.183
1992	205	25.789	2008	158	25.381
1993	136	18.511	2009	158	24.272
1994	188	22.078	2010	204	28.232
1995	200	23.345	2011	172	19.775
1996	232	28.637	2012	153	23.144
1997	273	27.727	2013	178	25.344
1998	208	28.769	2014	107	14.024
1999	208	24.460	2015	172	25.629
2000	235	25.869	2016	189	32.323
2001	222	31.520	2017	139	23.353
2002	174	26.451	2018	127	19.483
2003	224	28.424	2019	150	28.194
2004	183	27.295	2020	78	16.906
2005	159	23.780	2021	106	16.088
2006	204	30.078	2022	100	15.871



En 2022 surmerkatiĝis **100 libroj** kun **15.871 paĝoj**, nur en 2020 la rezulto estis pli magra. La ĝenra distribuo (vidu la paĝosuban tabelon) montras, ke nun aperas malpli multaj lerniloj ol antaŭe, ja nun oni pli lernas rete, sed ne per paperaj libroj.

## EAB plej supre eĉ sen “Unu animo homa”

Dum 12 el la 15 lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia) de Vilhelmo Lutermano. Sed jam en 2021 lia elano ĉesis, kaj unualoke estis la Novjorka *Mondial*. En 2022 ni havas du “venkintojn”, la britan asocion kaj la Antverpenan eldonejon *Libera*. Efektive, EAB eldonis pli multe, sed en LA mankas la eldonaĵo, kiu meritas esti “La Verko de la Jaro”: duvoluma poezia verkaro de Marjorie Boulton; ĝi donus el EAB pliajn du volumojn kaj 1212 paĝojn.

2022. Libroj	2022. Paĝoj	
EAB (Britio)	9	Ars Libri 1757
Libera (Belgio)	9	KAVA-PECH 1479
Mondial (Usono)	7	Mondial 1341
Fonto (Brazilo)	6	E@I (Slovakio) 1098
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	6	BES 1085
Ars Libri (Pollando)	5	Impeto 1043
BES (Pollando)	5	Libera 899
Horizonto (Japanio)	4	La Ranetoj (Svedio) 746
Impeto (Ruslando)	4	Fonto 629
KEA (His.), LF-Koop (Svi.)	4	Horizonto 552

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2021	2022	1991-2022 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	106	100	5.691
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	16.088	15.871	788.016
Averaĝa paĝonombro de 1 libro	120,3	145,2	155,7	151	158,7	138,5
Averaĝa prezo de 1 libro (eŭroj)	8,20	11,40	12,10	13,22	14,45	10,50
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	6	9	790
Originala beletro	258	214	213	25	19	729
Traduka beletro	458	361	330	21	47	1217
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	12	4	630
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	241	299	173	13	8	734
Politiko, historio, filozofio, socio	166	228	248	15	11	668
Scienco kaj tekniko	182	93	33	6	1	315
Religio	105	93	72	4	1	275
Aliaj temoj	172	107	50	4	0	333

La ordo en la resuma listo por 32 jaroj ne ŝanĝiĝis en la librokolumno, sed *Mondial* rompis la unualokecon de MAS laŭ la nombro da presitaj paĝoj. UEA, kiu eldonis nenion, en 2022 el la sesa loko glitis al la oka.

<b>1991-2022. Libroj</b>		<b>1991-2022. Paĝoj</b>	
MAS	219	Mondial	33.150
UEA (Nederlando)	168	MAS	32.366
Libro-Mondo (Pollando)	163	FEL	28.749
Mondial	161	Fonto	24.473
FEL	148	Libro-Mondo	22.925
Fonto	148	KAVA-PECH	21.907
Impeto	135	Impeto	21.332
KAVA-PECH	125	UEA	21.160
Edition Iltis (Germanio)	116	Sezonoj (Ruslando)	14.673
La Blanchetiere	90	AEP (Svislando)	12.789

### En kiu lando oni eldonis plej multe?

Respondo al la subtitola demando: en Belgio kaj en Pollando. Sed Francio plu avangardas en la resuma listo por 32 jaroj kaj longe ne cedos sian unualokecon.

<b>2022. Libroj</b>		<b>2022. Paĝoj</b>	
Belgio	11	Pollando	3059
Pollando	11	Usono	1841
Britio	9	Ĉeĥio	1479
Usono	9	Slovakio	1388
Japanio	8	Belgio	1258
Brazilo	6	Ruslando	1131
Ĉeĥio	6	Japanio	849
Francio	6	Francio	826
Hispanio	6	Hispanio	783
Ruslando, Svislando	5	Svedio	746

<b>1991-2022. Libroj</b>		<b>1991-2022. Paĝoj</b>	
Francio	750	Francio	86.266
Germanio	466	Brazilo	54.935
Pollando	396	Germanio	54.545
Nederlando	343	Japanio	54.265
Brazilo	336	Pollando	50.547

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# En la mondo blovas nova vento

Printempe filminteresitoj rigardas al Holivudo. Certe, la plej gravaj filmfestivaloj estas alloke, sed la disdono de Oskarpremioj estas daŭre la plej grava monda filmevento. La Oskar-akademio ne plu volas esti institucio de maljunaj blankhaŭtaj viroj kaj plivastigis kaj internaciigis sian membraron. Tio sekvis al decidoj, kiuj foje mirigas maljunajn blankhaŭtajn virojn (kiel mi), sed pri tio ni parolu poste.

Por scii, kio okazas tutmonde en kinejoj la mallonga listo de internaciaj produktaĵoj estas uzebla gvidilo. Unue ni ĵetu rigardon al tiu listo.

## IDENTECO KAJ ADOLTIĜO

En 2023 surprize aperis filmo por Kamboĝo en la mallonga listo. Davy Chou, la reĝisoro de *Reveno al Seulo*, loĝas en Francio. Li rakontas la historion de denaska koreanino, kiu estis adoptita de franca paro. La filmo estas kompleksa dramo pri serĉado de propraj radikoj, heredo, alproprigo kaj trovi sian identecon. Similajn temojn pritraktas la franca filmo *Saint Omer* de Alice Diop, kio baze estas iom tenaca tribunaldramo.

Tri filmoj de la listo temas pri adolesko, ekzemple tre ĉarma filmo el Barato: *Chhelo Show* (La Lasta Filmprezento) de Pan Nalin. Tiu filmo en guĝarata lingvo ne estis produktita laŭ la kliŝoj de Bollywood. Ni sekvas la adoltiĝon de la knabo Samay, kiu unufoje estas kun sia patro en kinejo kaj grandokule miras pri la mirakloj de filmoj. Li volas esti kreanto de tiuj mirakloj, sed lia patro estas iom strikta kaj opinias, ke tiu vivovojo ne oportunas por membroj de ilia kasto, sed Samay ne akceptas tion. Li lernas persiste, kiel el lumo fariĝas filmoj kaj revoj. *La Lasta Filmprezento* vekas memorojn al *Nuovo Cinema Paradiso* de 1988. *La Fabelman'oj* de Steven Spielberg rakontas similan, sed pli epikan intrigon.

Lucas Dhont el Belgio prezentas en *Close* (Proksime) la historion de sincera amikeco inter du knaboj. Ili estas koramikoj kaj jen ĉio, do homofoboj trovus nenion por hurlti. Vulgara klaĉado dividas la amikojn kaj havas tragikan konsekvencon. Dhont denove prezentas intensan kaj empatiplenan intrigon, kiel jam en *Knabino* de 2018. Por mi *Proksime* estas unu el la plej bonaj filmoj de la jaro.

Filmoj el Irlando en la loka irlanda lingvo estas maloftaj en kinejoj ĉe mi. *An Cailín Ciúin* (La trankvila knabino) de Colm Bairéad estas agrabla renkontiĝo. Ne okazas multe en tiu filmo, estas kvazaŭ sekvo de banalaj okazintaĵoj, sed mi, kiel spektanto, volonte sekvis someron kun Caitlin, la trankvila knabino. Ŝia familio estas malriĉa, la gepatroj ne



tro zorgas pri siaj infanoj. Nova bebo estas survoje kaj Caitlin estas forsendita al foraj geonkloj. Tie ŝi spertas por la unua fojo familion kiel hejmo.

Filmoj el Pakistano kaj Maroko temas pri “netradicia”, sed tamen sincera amo.

En *Joyland* de Saim Sadiq la sentoj de juna pakistanano konfuziĝas kiam li enamiĝas al transgenra dancistino. La filmo esploras subpremon kaj deziron en konservativega tradiciema socio. Finfine ĝi ne ofertas solvon, sed prezenti demandon jam signifas ion en tiu kadro.

El Maroko venis unu el la plej belaj amrakontoj de la jaro: *La blua kaftano* (Le bleu du caftan) de Maryam Touzani. Jam ŝia debuto *Adam* (2019) estis impresa kaj videnda rakonto pri la vivkondiĉoj de virinoj en Maroko. *La blua kaftano* temas pri la tajloro Halim kaj ties edzino Mino. Halim laboras laŭ tradiciaj principoj, do liaj varoj estas iom kostaj, kaj tial ilia komerco iom krizas. Halim havas sekreton, ĉar li deziregas virojn. Ankaŭ Mina havas sekreton, ĉar ŝi prisilentas, ke ŝi estas morte malsana. Ili prenas metilernanton Youssef. Iom post iom ekkreskas sentoj inter Halim kaj Youssef. La rolon de Mina ludas la grandioza Lubna Azabal. Tre memorinda estas sceno en ilia hejmo: Mina dancas laŭ muziko de la radio. Ŝi invitas la edzon danci kun ŝi kaj ankaŭ la lernanton, tiam ŝi flankentiras kaj lasas la du virojn sole kaj rigardas ilin kun granda simpatio, amo kaj kompreno. Mi deziras, ke tiu filmo ne restu en iu niĉo, sed estu spektata de multaj filmŝatantoj kun malferma menso.

## TUTMONDA DISTRADO



Pri historiaj temoj rakontas *Argentino*, 1985 de Santiago Mitre kaj *Corsage* (Korseto) de Marie Kreutzer. Tiu lasta estas libera inista fantaziaĵo pri la vivo de imperiestrino Elisabeth de Aŭstrio. Verdire mi ne plene komprenas, por kiu Kreuter faris tiun filmon kaj kial ŝi trudas ĝin al la publiko. La filmo el *Argentino* rakontas dramace kaj distre pri la klopodoj meti la krimulojn de la militista diktaturo al tribunalo.

Du filmoj pri problemoj de meza oriento venis el Skandinavio. Ali Abasi el Danio rakontas pri seria murdisto en *Sankta araneo* (Ankabut-e moqaddas). Religia fanatikulo murdas prostituitinojn en la sankta urbo Maŝhado en Irano. *Sankta Araneo* estas terurfilmo kaj, ŝajnas al mi, iom nekutima elekto por la plej bona internacia filmo, samkiel *Knabo de la ĉielo* (alternative *Kairo-Konspiro*) de Tarik Saleh de Svedio.

Juna idealisto fariĝas viktimo en intrigo inter ŝtato, religia universitato kaj sekreta servo. La intrigo sekvas konatajn modelojn en la maniero de ekzemple *Le Carré*.

*Decido foriri* (Decision to leave) de Park Chan-wok el Koreio estas plia popularĝenra filmo, tamen kun pliaj tavoloj kiam polickomisaro enamiĝas en ebla murdisto. *Bardo, eltrovita kroniko de manpleno da veroj* de Alejandro G. Iñárritu estas



kvazaŭaŭtobiografia filmo. La filmo meandras de unu turniĝo al alia, tamen mal multe el la intrigo restis ĉe mi.

*EO* de Jerzy Skolimowski el Pollando estas nova adaptiĝo de la klasikaĵo *Ekzemple Baltasaro* (Au hasard Balthazar) de Robert Bresson. La filmo ne taŭgas por rapidemaj spektantoj, sed ĉiuj aliaj sekvos kompateme la vagadon de azeno tra Eŭropo.

Mi volas aldoni kiel honoran mencion, la filmon *La plej feliĉa viro de la mondo* (Najsreĝniot Ĉovek na Svetot) de Teona Strugar Mitevska el Norda Makedonio. Dum la intercivitana milito en eksa Jugoslavio Zoran estis devigita pafi al siaj najbaroj. Tio influas kaj fuŝas lian tutan vivon. Li sopiras al pardono kaj iutage li renkontas sian viktimon. Tiu filmo memorigas al ni, ke militoj pludaŭras ankaŭ post armisticoj kaj pactraktatoj.

## ĈU VERE?

Ni devas tamen ankaŭ paroli pri la filmo, kiun la komitato elektis kiel la plej bonan internacian kontribuon: *En okcidento nenio nova* (Im Westen nichts Neues) de Edward Berger. Jam en 1930 estis la unua filmadapto, farita en Usono de Lewis Milestone. Neforgesebla estas la lasta sceno, kiam la junuloj rigardas al la publiko, dum ili marŝas al sia pereco. *En okcidento nenio nova* memorigas, ke en militoj ne estas herooj, nur kripluloj kaj kadavroj. Tiu mesaĝo estas neforgesenda kaj, ve!, konsternante aktuala. Por la unua fojo la libro de Remarque estis filmita en Germanio. Sen la mono de Netflix tiu filmo ne ekzistus. Mi timas, ke Netflix trometis sian profilon sur la filmon. Ĝi estas kvazaŭ James Bond en la tranĉeoj. Historiistoj montris gravajn erarojn, sed la eraroj liveris dramecajn scenojn kaj frapajn fotojn kaj tiuj nun bedaŭrinde decidas, kiel la ĝenerala publiko bildigas al si la unuan mondmiliton. Krome Berger forlasas la etoson de la libro, ĉar Remarque rakontas nur el la perspektivo de la junaj soldatoj. Entute: vide frapa, teknike brila filmo, sed maksimume libera interpretado de la romano de Remarque. Mi suspektas, ke precipe pro arda kampanjo de Netflix ĝi rikoltis tiom da Oskaroj.



**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## “Mesaĝon aŭdas mi, sed mankas al mi kredo”<sup>1</sup>


Rokicki, Ryszard. *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2022. – 88 p. – (Serio Scio, №11).

Komence mi klarigu, kion signifas la temo de la recenzata libro: *morfologio*. Tiu helena termino nomas la tuton de la diversaj vortformoj kaj konsistigaj elementoj en lingvo (do ekz. radikoj, finaĵoj), kaj samtempe ties analizon kiel parton de la lingvoscienco. La libro (kaj ĉi tiu recenzo) celas evidente legantaron, kiu jam sufiĉe bone konas tiun temaron, kaj leganto nova al la lingvo aŭ al Esperanta lingvistiko verŝajne havos problemojn sekvi la pensojn de la libro aŭ simple kompreni la neklarigitajn mallongigojn kaj aludojn al aliaj verkoj.<sup>2</sup>

La morfologio de Esperanto, precipe la vortfarado, estas kompleksa kaj interesa temo, kiu sekvigis ne nur amason da sciencaj esploroj (bedaŭrinde preskaŭ nur de Esperantistoj), sed eĉ en 1908 la estiĝon de Ido (kies ĉefa aŭtoro Couturat kritikis antaŭ ĉio tiun vortfaradon – kiun li simple ne ĝuste komprenis, kiel montris poste René de Saussure). Rokicki, kiu jam de jardekoj intense okupiĝas pri tiu temo, en sia libro promesas novan (kaj per tio kompreneble pli bonan) aliron al la Esperanta morfologio. Mi do ekzamenis, kiasence la promeso estas plenumita. Por tio, mi ĉi-recenze respondu la sekvajn demandojn pri la libro: Ĉu ĝi bone prezentas la problemon (precipe: kie estas la mankoj de la ĝisnunaj teorioj)? Ĉu ĝi bone klarigas la metodojn uzatajn por la lingva analizo? Ĉu ĝia nova teorio estas pli simpla kaj same klar(ig)a, aŭ, se ne pli simpla, almenaŭ pli klar(ig)a ol la ĝisnunaj teorioj? Ĉu la libro estas konciza kaj klare legebla por ĝia celgrupo kaj lingve/komposte senerara?

Por komenci per la lasta, formala-banala demando: Stile-terminologie la libro ne estas riproĉinda, kun la escepto de la misuzo de *semantiko* anstataŭ simpla *signifo* (koncedinde, tio aperas ĝenerale ofte en la literaturo lingvistika), kaj eble la vorto *dezinenco* (p. 56), kiu ne troveblas en PIV aŭ Reta Vortaro. Mi trovis la sekvajn mistajpojn aŭ aranĝajn neglataĵojn: p. 5 “bibliorgafiaj”, p. 28 “Analizante”, p. 37 “H2Q”, p. 40 “venos<sup>2</sup>” (ĉu estu “z” aŭ ĉu mankas piednoto?), p. 62 “*hejmece*” (laŭ la kunteksto estu *hejme*), p. 65 “k<i>uj”. Krome sur p. 44 kaj (trifoje) 49 komencaj krampoj erare estas kursivaj; sur p. 55 mankas interspaco en “*akvon<sup>2</sup>(urini)*”, male sur p. 65 estas troa spaco en “SKRIB\_[s]”; sur p. 66 estas troa komo post “materialo”. La ununura komposta eraro estas la manko de kelkaj paĝnumeroj en la enhavtabelo sur p. 82.

Neniu el tiuj eraroj malhelpas la komprenon aŭ legadon. Kiel mi jam diris, la



celgrupo de libro estas progresintaj uzantoj de Esperanto; tiuj devus ne havi problemon digesti ĝian enhavon, do la libro estas taŭge verkita.

La libro konsistas el kvin ĉefaj ĉapitroj. Post tre mallonga enkonduko (ĉapitro 1) la aŭtoro en ĉapitro 2 (kies titolkomencan vorton “Tekstoanalizo” mi ne vere kaptas) motivigas sian sistemon kaj eksplikas ĝin en ĉapitro 3. La ĉefa ĉapitro 4 aplikas la sistemon al diversaj okazoj. Finas la libron la 5a ĉapitro, kiu traktas ne demandojn de la vortfarado, sed de la normo. Kvankam ĉi-lastaj meditoj estas interesaj (mi ne konsentas kun ĉiuj, mi aldonu), laŭ mia opinio pli taŭga loko por ili estus propra(j) artikolo(j) aŭ blogero(j), ĉar ili ne koncernas la vortfaradon specife. Anstataŭe utila estus iom pli ekvilibra trakto de ĉiuj fenomenoj morfologiaj de Esperanto, ĉar la libro videble fokusiĝas al la ideoj de la aŭtoro pri la signifo-rilato inter radikoj (kiel *ŝton*) kaj vortformoj (kiel *ŝtono*, *ŝtonaj*, *ŝtoniĝu*), dum aliaj temoj, precipe la afiks(oid)oj kaj ties specifaj trajtoj, ne estas detale traktitaj. Tiasence la libro ne estas enkonduko en la ĝeneralan morfologion de Esperanto, sed en specifan teorion pri (la centra) parto de ĝia morfologio.

Kaj, por finfine veni al la kernpunkto, kio estas tiu parto centra de la Esperanta morfologio? Temas pri la fama t. n. radikkaraktero. Tiu teorio, kiu (eble alinome) troviĝas en ĉiuj gravaj gramatikoj (PAG, PMEG) kaj alprenis oficialan karakteron per la Akademio, esprimas, por diri koncize, la sekvajn trajtojn de Esperantaj radikoj kaj vortformoj: Ĉiu Esperanta radiko apud sia signifo kiel leksemo (ekz. *ŝton*: “malmola minerala maso, diskreta kaj movebla”) apartenas al (plej ofte) unu el tri klasoj, kiuj lasas sin distingi laŭ la struktura signifo de la vortospecoj, kiujn oni derivas de ĝi (substantivo -o, adjektivo -a, adverbo -e, verbo -i [-as, ktp.]). Klaso I per si esprimas objekton, do plej tipe formas substantivon (ekz. *kruco*, kaj la signifo de la aliaj vortospecoj havas rilaton al tiu substantivo: *kruca*, *kruce*), klaso II esprimas kvaliton aŭ rilaton, do plej tipe formas adjektivon (ekz. *rapida*, kaj la aliaj vortospecoj signife rilatas al ĝi: *rapido*, *rapidi*), klaso III esprimas agon aŭ okazon, do plej tipe formas verbojn (ekz. *trinki*, kaj la aliaj vortospecoj signife rilatas al ĝi: *trinke*, *trinko*). Oni povas nomi la klasojn ankaŭ “aĵa”, “eca” kaj “ada”, kaj tiu respektiva klasa trajto restas stabila en ĉiuj derivitaj vortformoj (ĵa temas pri signifa parto de la leksemo), dum aldonaj trajtoj, kiuj estiĝas en la derivitaj vortformoj, dependas de la konkreta formo. Por preni faman ekzemplon: De la aĵa radiko *kron* kaj do tipa substantivo *krono* oni povas formi la verbon *kroni* (“provizi per krono”) per simpla ŝanĝo de la vortospeco, sed deverban substantivon (do “provizo per krono”) oni ne povas formi laŭ la sama simpla finaĵa interŝanĝo, ĉar tiu donus la originan, alisignifan *krono*; la verban signifon devas anstataŭi la sufiksoido -ad-, kio donas *kronado*.<sup>3</sup>

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Kulturo de popolo, popolo kun kulturo

**Esperanta Kulturo / Red. Ilona Koutny. – Dąbrówka: Wydawnictwo Rys, 2022. – 266 p.**


Mi diru tuj: ĉi tiun libron oni devas ne nur legi, sed ankaŭ studi; ne nur studi, sed serioze studi; ĉiu linio, eĉ ĉiu vorto estas instrua: ja ĝi estas universitata lernolibro. Unufraze dirite: temas pri plene ĝisdata ampleksa enciklopedio pri ĉiuj aspektoj de la esperanta kulturo, verkita per instrutaŭga stilo, kiun oni legas kiel romanon, ja la romanon de nia lingvo. Nenio en la lasta duonjarcento, post la epokfara *Esperanto en perspektivo* (ĉefred. I. Lapenna, UEA-CED, 1974), aperis pri la tiom grava temo.

Jam la titolo estas deklaro: Esperanto, nura lingvo, kreis propran kulturon tra sia pli ol 130-jara uziĝo. Tio ankoraŭfoje atestas, ke la opoziciantoj al tiu esprimo misinterpretas la fenomenon esperanto, fakte plejofte pro artifika persona malamikeco al kelkaj elstaraj konstruantoj de tiu kulturo.

Ĉi tiu 270-paĝa (bite) kolekto de 15 eseoj startas per longa eseo de la redaktoro, hungarino, dum pli ol jardudeko docentino ĉe la pollanda universitato kaj gvidanto de ĝia kurso pri interlingvistikaj studoj; sekvas dek kvar ĉapitroj de dek tri aŭtoroj el dek landoj, kiuj estas instruantoj aŭ studentoj de la nomita kurso.

Ilona diras klare: “Esperanta kulturo ekestis pro ĝia uzo en parolkomunumo, pro ĝiaj institucioj, eventoj, publikaĵoj ktp. Ĝi disvolviĝas nature kaj multflanke”. Kulturo estas *mensa programado*, komuna por iu komunumo, kaj ĝi okazas je tri niveloj: ni heredas nian homan naturon kaj tio estas universala; la kulturo jam karakterizas grupojn kaj estas lernata; la personeco, kiu estas por ĉiuj individua, konsistas el speciala miksaĵo de hereditaj kaj lernitaj elementoj. Tial nacia kulturo diferencigas diversajn homgrupojn, do ĝi estas baze ekskluziva, sed la Esperanta kulturo fontas kaj riĉiĝas el diversaj naciaj kulturoj, do ĝi estas *inkluziva*, kiel jam Auld karakterizis ĝin antaŭ 35 jaroj. Siavice, kvankam esperantistoj formas ja heterogenan grupon, certa komuneco observeblas, kaj jam Ragnarsson en 2006 rekonas en la Esperanta kulturo, “unuecon en diverseco”.

Pri la literaturo, certe la plej okulfrapa kulturero kvante kaj kvalite, ni havas du panoramajn verkojn: *Historio de la Esperanta Literaturo*, de italo C. Minnaja kaj svis-italo G. Silfer, gajninta du gravajn premiojn, kaj la anglalingvan enciklopedion de G. Sutton.



**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



## Necesaj studoj

**Tonkin, Humphrey. *Memoru ĉi praulojn. Eseoj pri Esperanto-literaturo*. – Novjorko: Mondial, 2020. – 251 p.**

En 2010 aperis *La arto labori kune*, monumenta verko por omaĝi Humphrey Tonkin okaze de lia 70a datreveno. Ĝi tuj fariĝis nemalhavebla referenca libro en la kadro de esperantologio kaj konsistigis agnoskon al tuta vivo dediĉita al la studo de la internacia lingvo. Longe post tia evento, respondo venis sub formo de pinta libro, kvazaŭ pluigante dialogon kun nia komunumo, ankoraŭ reprenante la fadenon de tiu interŝanĝo, kaj ĝi sendube estas unika donaco.

Ĝia titolo *Memoru ĉi praulojn: eseoj pri Esperanto-literaturo* bezonas klarigon. Ĉi tie la vorto *literaturo* uziĝas vastasence – la aŭtoro pritraktas ne nur la originalan literaturon, sed ankaŭ nian traduk-literaturon, ja tre gravan en la kulturo esperanta. La *prauloj* estas verkistoj apartenantaj al diversaj periodoj de nia beletro, nome de la 2a ĝis la 3a, kvankam en la paĝoj menciigas ankaŭ nuntempaj aŭtoroj. Ĉiujn Tonkin nun trastudas iel kompletige aŭ kompanse, oni emus kredi, al la multaj volumoj dediĉitaj de tiom da aŭtoroj al Zamenhof kaj lia epoko. La eseojn, kiuj kunformas la libron, eblus dividi en tri grupojn, nome: ĝeneralajn artikolojn (komence kaj fine de la volumo), tradukologiajn tekstojn, kaj studojn de unuopaj aŭtoroj kaj verkoj. Krom la prezentoj verkitaĵ por la nuna kolekto, ĉiuj eroj aperis jam en aliaj, diversaj publikaĵoj.

La unua artikolo enhavas tre interesan analizon de poemoj de Kalocsay kaj prezenton de la ligo al poezio sentita de Zamenhof kaj de liaj jidaj versaĵoj (p. 16). Menciindas la detala kronologio de la zamenhofaj poemoj kaj la brilaj komentoj priaj, ekzemple, per trasurado de bibliaj bildoj en *La Espero*. Tonkin rezonas pri la ideoj pri lingvo kaj kulturaj elementoj kiel programo por konstruo de identeco (eblus aserti, sur la linio de Even-Zohar). Aldoniĝas trafa kuntekstigo de la literaturo, aludoj al psikanalizo (Lacan), al vento kaj spirito kiel du flankoj de unu sola medalo (fakte la sanskrita epiteto donita al Gandhi, *mahātmā*, t. e. 'grandanima' rilatas al la helena ἀνμός 'vento', de nia vorto atmosfero). Sekvas tio, kion la aŭtoro nomas "ekskurso" (p. 25): plezura promenado tra la koncepto *espero* en nia originala literaturo. La eseo povus funkcii grandparte ankaŭ kiel gvidlibro por la *Esperanta Antologio* (1958, 1984), al kiu ĝi konstante sendas.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



## Realeco de Mikel Klav: La unua muzika albumo en 2023



La 6an de januaro 2023 estis oficiale lanĉita la bit-albumo *Realeco* de Mikel Klav – brazila alternativa Esperanta muzikisto el la urbo Niterói en la subŝtato Rio-de-Ĵanejro. Mikel kantas kaj ludas klavaron. Lia stilo kaj influoj venas de populara, pop-roka kaj klasika elektronika muziko. Li ekkantis en Esperanto tuj post la lernado de la lingvo komence de la 1990aj jaroj, unue en la evento ECO-92, poste en multaj renkontiĝoj dum 1992-95. Tiam li komponis la kanzonojn *Diferencoj* kaj *Senbrida mond'*, tiam ili ne estis registritaj, sed almenaŭ skribitaj kaj garditaj.

En 2013 Mikel Klav revenis al Esperanto kaj partoprenis en kantokonkursoj de *Kontakto*. Tiam li registris demoversiojn de la kanzonoj *Brila stelo* kaj *Diferencoj*. Liaj koncertoj okazis en diversaj Esperantaj eventoj en Rio-de-Ĵanejro, interalie, en la 50a Brazila Kongreso de Esperanto (2015). En 2016 li estis invitita al San-Paŭlo por la 10a Kongreso de Esperanto de San-Paŭlo en Belinsulo, kie li prezentis sian kanzonon *Mia idolo Ĉarli Ĉaplin (Karleto estas...)*. Ĝi plaĉegis al la ĉeestantaro, antaŭ kiu sur granda ekrano aperis filmeto de Ĉaplin, kiu lasis la publikon ridema dum la kanzono. Lastatempe li partoprenis en la Konkurso Ĝanfranko 2022. Li ankaŭ komponis la kanzonojn *Realeco*, *Aerobus'* kaj *Ŝanĝo de l' sezonoj*.

La supre menciitaj muzikaĵoj estas aŭskulteblaj en lia unua albumeto *Realeco*, kiun Mikel Klav prilaboradis dum 2022 kaj kunproduktis kun *Vinilkosmo* por publikigo en januaro 2023. La albumo estis aranĝita per modernaj virtualaj muzikiloj (VST): gitaroj, basgitaroj, specialaj efektoj, sampliloj, drumoj kaj drummaŝinoj.

La bita albumo *Realeco* (ref.: VKBA038-086) enhavas sep kanzonojn kaj daŭras 33 minutojn. Ĝi estas disponebla laŭ la formatoj MP3 (320 Kb/s), OGG, FLAC kaj kiel elsendfluo. La prezo estas nur sep eŭroj.

Ĉiuj kantoj de *Realeco* estis registritaj en lia hejmsstudio en Niterói. La miksado kaj mastrigado estis farita de Triboulet en Studio de La Trappe en Donneville kune kun *Vinilkosmo* sub muzikdirektorado de Floréal Martorell.

Voĉoj, elektronikaj voĉoj, kantado kaj klavaroj: Mikel Klav. Muzikaranĝoj: Mikel Klav.

Grafika arto kaj kovrilo: Mikel Klav. Reviziado de la tekstoj: Rikardo Cash.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# Nova senpage libro de *Sezonoj*: *Dek du rakontoj* de Paulo Sérgio Viana

Paulo Sérgio Viana

*Dek du rakontoj*



Viana, Paulo Sérgio. *Dek du rakontoj* / Kompilis Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2023. — 49 p. — (Virtuala Biblioteko de Sezonoj, №22).

La 28an de februaro 2023 en la Virtuala Biblioteko de *Sezonoj* aperis nova senpage elŝutebla bitlibro — *Dek du rakontoj* de Paulo Sérgio Viana.

Paulo Sérgio Viana [prononcu: páŭlu sérĵju víána] estas brazila kuracisto, naskiĝinta en 1948. Li loĝas en la urbo Lorena, en la brazila ŝtato San-Paŭlo. Dum kvindek jaroj li laboris kiel fakulo pri gastroenterologio en negranda, internlanda urbo. Tie li konstante kunvivadis kun popolanoj kaj povis kolekti multajn kuriozajn

okazaĵojn, kiujn li uzis en siaj rakontoj.

Paulo S. Viana lernis Esperanton kiel 11-jara lerneĵano. Li aktivis kiel fondinto de Brazila Esperantista Junulara Organizo, estis estrarano de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP). Nun li estas redaktanto de la revuo *La Lampiro*, regula kontribuanto al la *Esperanta Retradio* kaj al *La Ondo de Esperanto*. Li produktas filmetojn por la *Viva Gazeto* de EASP en jutubo kaj ankaŭ por sia propra kanalo. Interesita pri literaturo, li estis plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio.

Preleganto en multaj brazilaj Esperanto-eventoj kaj tradukanto, li estas aparte interesata pri Esperantigo de verkoj de la brazila klasikulo Machado de Assis. Paulo S. Viana estas aŭtoro de du originalaj novelaroj: *Nigra birdo kaj aliaj rakontoj* kaj *Estu purigita!* – preskaŭ hereze, publikigitaj de EASP. *Dek du rakontoj* estas lia tria novelaro.

La rakontoj, publikigitaj en ĉi tiu volumeto, aperis dum 2020-22 en dek du sinsekvaj eldonoj de *La Ondo de Esperanto*. Ni volonte donacas ĉi tiun novelaron al la ŝatantoj de la Esperanta literaturo, kaj esperas, ke vi ŝatos ĝin.

La nova, 49-paĝa bitlibro estas senpage elŝutebla laŭ la normoj pdf kaj epub ĉe la Virtuala Biblioteko de *Sezonoj*, en kiu nun estas 20 senpagaj kaj du aĉeteblaj libroj kaj kelkaj provnumeroj de *La Ondo de Esperanto*.

Elŝutu ĉe: [https://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libro\\_j.php](https://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libro_j.php).

***Agrablan legadon!***

**Halina Gorecka  
Aleksander Korĵenkov**

# *Mozaiko*



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.



# Aĥ, tiuj virinoj...

Printempa averta por la virinoj: vestoj, kiuj longe kuŝas en ŝranko, malgrandiĝas!

Du amikinoj interparolas:

- Mi amaras kun mia edzo nur tri foje semajne.
- Kaj mi ĉiutage.
- Sed vi ne havas la edzon!
- Pardonon, mi pensis, ke ni parolas pri la via.

Virinoj ofte plendas, ke la viroj bezonas de ili nur unu aferon. Sed seksbutikoj klare atestas pri malo: viroj aĉetas gumajn virinojn komplete, dum virinoj bezonas nur unu korpoparton.

Vidinte plian foton ĉe profilbildo de mia samaĝulino mi komprenis, kial la registaro altigis emeritiĝan aĝon – tiaj junulinoj simple ne povas esti pensiuloj.

Kuracista sugesto por pensiuloj: se simpatia virino demandas vian nomon, petas vin rideti kaj svingi la manon, ne hastu ĝoji vane – plej verŝajne vi havas apopleksion.

Se io ne videblas sur la foto de virino en socia reto – oni prefere ne vidu tion.

Virinoj estas la plej pardonemaj juĝistoj. Hieraŭ virino en polica uniformo arestis min pro suspekto pri lerta seksumado. Sed jam post dek minutoj ŝi diris ke mi estas libera pro komplete manko de pruvoj.

Kiel igi junan fraŭlon fari ĉiutagan purigadon en sia ĉambro? Sugestu al li ekhavi samtempe amrilatojn kun blondulino kaj nigroharulino.

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**



# Spritaj splitoj kaj preskeraroj

## *El la kolekto de reduktoro*

### *Lipa servo?*

La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fikisi la datojn... (Gazetara Komunikado de UEA, 2023, №1095; trovis Ibrahim Bryzgaloff, uea.org/aktuale/komunikadoj/2023/UEA-kongresos-en-Arusxo-Tanzanio-en-2024)

### *Kapaltera konigado*

Mi laboris por konigi Ĉinion al la mondo, kaj renverse la mondon al Ĉinio. (*Esperanto por mi. 16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner*. Horizonto, Gunma, 2020, p. 15; rimarkis Ionel Oneț)

### *Kampanjo lama dekomence*

eklamkampanjo de ecuio mijoŝi (Renato Corsetti, titolo de mesaĝo, 27 jan 2023, groups.io/g/uea-membroj/topic/96565298)

### *Feliso translokis kajuton*

Eduka kaj ĝojiga rakonto pri transloĝiĝo de kabino, kiun helpas kato. (katalogo.uea.org/?inf=801; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

### *Lante ekŝiĝas akuzativo*

Malrapide finiĝas la jaron 2022. (Robert Kamiński. *Redaktoraj vortoj // Pola Esperantisto*, 2022, №6, p. 2)

### *Kroma to por Estonio*

La estonta lingvo kaj kulturo (István Ertl kaj Liina Vahtrik) (Amri Wandel. *Novjaraj renkontiĝoj: IF, IS, NR, JES kaj Luminesk' // Esperanto*, 2023, №2, p. 39)

### *Pli frue nur difektaj*

Menciindas, ke unuafoje al BET venis funkcianta prezidanto de Universala Esperanto-Asocio prof. Duncan Charters. (Povilas Jegorovas. *Esperanto en Litovio 2022: atingoj kaj malsukcesoj*, sezonoj.ru/2022/12/litovio-54)

### *Plu doĵmarkoj en orienta Germanio?*

Kune kun Kroatio, el la landoj de la jama sovetia bloko nur Slovenio kaj Slovakio, plus la tri baltaj respublikoj, enkondukis eŭron: la ceteraj konservas la antaŭajn valutojn. (*Kroatio enkondukas eŭron kaj eniras la Ŝengen-areon // HeKo 803 7-E*, 31 dec 2022, esperantio.net/index.php?id=4678)

Plukis **István Ertl**

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

**Ĉinio:** Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Hungario:** Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Norvegio:** Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

**Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>